Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 22 — Trimonata

3/92

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: KOVÁCS Márta

Vic-redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

.01.02/=1

Enhavo

CORSETTI, R., TAESCHNER, T., Kiel trilingva infano lernas distingi inter lingvoj 1
GLOSSOP, Ronald, Konferenca raporto pri Bratislavo 11
BARCSAY, Zsuzsa, Internacia kaj amikeca (Unua gimnazio de ILEI) 11
Protokolo sinteza de la Komitato de ILEI en Bratislavo 14
Eduka rezolucio akceptita de la Komitato de UEA en Vieno 15
GLOSSOP, Ronald J., Esperanto kiel unua fremda lingvo 16
MacGILL, Stefan, Skemo por la intensiva kurso por instruistoj (Poprad) 21
ARNAUDOV, Petko, Leciono pri Matematiko (el la Gimnazio) 24
BELOSEVIC, Marija, Landaj sekcioj de ILEI, raportoj pri 1991/92 29
Aliĝpeto el Kubo (laŭ leteroj de Hektor JIMENEZ) 31
Informoj pri la kresko de *Juna amiko* en 1993 33
Recenzoj (Step by Step in Esperanto, M. Bulter *(smg)*; Mi vizitis grandan urbon, G. Koffi; Maria kaj la grupo, EMBA; Fajron sentas mi interne, U. Matthias *(W. Klag)*; La ŝalmisto de Hamelin *(smg)* 34
ILEI Labortable: la eksteraj rilatoj en Eŭropo (smg) 37
BUĜETOJ de ILEI 1991-1993 (ba/smg) 40

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MacGill, Eso u 7 III, H-1034 Budapest, Hungario. Mesaĝoj tra HEA: (36 1) 1560 244. *Kunordigo, planado, eldonado, rilatoj kun UEA kaj la movado.*
Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*
Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb- Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj nefaka programo.*
Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*
Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio.*
Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongingun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*
Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüell, Germanio. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*
Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, H-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

Artikoloj en preparo estas de Elizabeto Formaggio (Italio) pri la sintenoj de gimnazianoj en diversaj eŭropaj landoj al lingvo-lernado, laŭ ampleksa enketado, kaj de d-ro Duncan Charters (Usono) pri la plej gravaj elementoj en la trejnado de Esperanto-instruistoj. La nov-jara mesaĝo de la prezidanto esploros tiun saman temon.

KIEL TRI-LINGVA INFANO LERNAS DISTINGI INTER LINGVOJ

R. CORSETTI, T. TAESCHNER

Malsama versio de ĉi tiu studo estis prezentita al la 2-a Eŭropa Konferenco pri la Psikologio de Infana Evoluo, Romo 1986.
Tradukis Anna Löwenstein

1. Enkonduko

Dum la lastaj jaroj okazis multaj studoj pri la maniero laŭ kiu junaj infanoj samtempe akiras du lingvojn. Krom pluraj artikoloj, aperis multaj esploroj pri tiu temo, inkluzive de la jenaj: Saunders (1982), Baeteny-Peardsmore (1982), Taeschner (1983), Fantini (1985), Kielhofer kaj Jonnekeit (1983), kaj pluraj aliaj.

Ekzistas, tamen, malpli ofta fenomeno, kiun oni apenaŭ esploras, t.e. kazoj de frua trilingveco. Ni tute ne konas studojn pri tiu temo, krom unu sufiĉe eksdata de Murrell, kiu analizas la lingvaĵon de sia filino, kiu estas trilingva en la finna, la sveda kaj la angla. Krome, unu-du aliaj studoj estas nun verkataj.

Tamen, trilingvaj infanoj ja ekzistas, kaj valoras rigardi la procedon laŭ kiu ili akiras lingvon. Tiu estas interesa temo en si mem (kiel infanoj aliras la taskon lerni tri lingvojn samtempe?), kaj ĝi estas interesa ankaŭ laŭ eduka vidpunkto (ĉu trilingva edukado estas bona ideo, aŭ ĉu ĝi povus rezultigi problemojn? Kiel oni devus aliri ĝin?).

La celo de ĉi tiu artikolo estas ekanalizi kelkajn aspektojn de la maniero laŭ kiu trilingva infano, Gabrielo, akiras lingvojn. Li loĝas en Romo, kaj estas en denaska kontakto kun tri lingvoj: la itala, la angla kaj Esperanto.

2. La lingva fono

La patro de Gabrielo estas itala kaj lia patrino estas angla, sed inter si ili parolas nur Esperanton. Ambaŭ gepatroj sufiĉe bone konas la lingvon unu de la alia, sed ili uzas ĝin nur kiam tio aparte necesas, ekzemple dum vizitoj de parencoj.

La patrino de Gabrielo parolas al li en la angla kaj lia patro en Esperanto. Tio signifas, ke ili uzas la metodon "unu persono/unu lingvo," uzitan de Ronjat (1913) laŭ la konsilo de lia amiko Grammont.

Gabrielo havas plurajn kontaktojn kun la itala, precipe pro sia itala prizorganto. Dum la periodo de ĉi tiu studo, ŝi prizorgadis lin 8-10 horojn semajne.

3. La metodo por kolekti la informojn

Ĉi tiu studo baziĝas sur informoj, kiujn oni kolektis per tri metodoj: taglibro, serio da sonbendoj kaj testo. Informoj estis sisteme notataj en la taglibro ekde la momento, kiam Gabrielo ekparolis. Ili ankaŭ priskribis la situacian kuntekston en kiu liaj diraĵoj okazis, krom eventualaj gestoj, kiujn li uzis samtempe.

Kiel ekzemplo, sekvas ero el la taglibro, kiam Gabrielo havis la aĝon 1;9,28 (t.e. unu jaro, naŭ monatoj kaj dudek ok tagoj).[1]

- La kato eniras la domon kaj p-ino sensukcese provas ĉasi ĝin eksteren. Post iom da tempo, la kato malaperas.
- *P-ino (al G.):* Where did it go? (Kien ĝi iris?)
  [G. fingromontras ekster la pordon. P-ino rigardas, kaj vidas, ke efektive la kato estas ekstere.]

En la taglibro, la diraĵoj de Gabrielo estis transkribitaj per simboloj el la Internacia Fonetika Alfabeto. La celo estis distingi inter la diversaj anglaj vokaloj kaj inter la Esperantaj kaj italaj konsonantoj.[2]

Krome, oni notis la okazojn kiam Gabrielo vojaĝis al Anglujo, vizitojn de liaj anglalingvaj geavoj, partoprenon en Esperanto-kongresoj kaj kontaktojn kun anglaj kaj italaj infanprizorgantoj. La celo estis noti periodojn, kiam lia kontakto kun unu el la lingvoj estis pli intensiva ol kutime, ĉar tio povus influi la ritmon de lia akirado.

La unua ero en la taglibro datas de kiam Gabrielo havis dek monatojn. Oni plutenis ĝin ĝis li havis tri jarojn.

La gepatroj ĉiumonate faris duonhoran sonbendon de Gabrielo. Poste ili zorge transkribis la enhavon kun detalaj notoj pri la situacio kaj la kunteksto.

Kiam Gabrielo estis du-jara, oni testis lian komprenon de frazoj. La testo estas detale priskribita sube en paragrafo 4.3.

4. Rezultoj

4.1 Pluraj lastatempaj studoj pri frua dulingveco montras, ke kiam dulingvaj infanoj ekparolas, en la komenco ili ne lernas ekvivalentojn samtempe kun "novaj" vortoj. (Vidu tiurilate la studojn de Volterra kaj Taeschner [1978], kaj Taeschner 1983], inter aliaj.)

"Ekvivalento" signifas vorton, kiun la infano ekuzas por koncepto, kiun ŝi/li jam esprimas en la alia lingvo.

Dulingva infano akiras sian vortprovizon laŭ la jena maniero:


- En la komenco, la infano produktas vortojn en ambaŭ el la du lingvoj sendistinge. Ĉiuj vortoj estas "novaj", t.e. la unua vortigo de difinita objekto aŭ ago. Ekzemple, la infano diras *tablo* en Esperanto sed ankoraŭ ne *tavolo* en la itala, aŭ ŝi/li diras *chair* en la angla sed ankoraŭ ne *seĝo* en Esperanto.

1. Ambaŭ gepatroj, sed precipe la patrino, notis informojn en la taglibro, en Esperanto. La mallongigoj estas jenaj: G. = Gabrielo, P-ino = patrino, P-ro = patro, ang. = angle, esp. = Esperante, it. = itale.

2. En ĉi tiu artikolo, la diraĵoj de Gabrielo estas reskribitaj per la normala literumado de la koncerna lingvo. La transkribo uzita en la taglibro estas aldonita en piednoto.

ago. Ekzemple, la infano diras *tablo* en Esperanto sed ankoraŭ ne *tavolo* en la itala, aŭ ŝi/li diras *chair* en la angla sed ankoraŭ ne *seĝo* en Esperanto.

- La infano komencas produkti ekvivalentojn nur en posta fazo (vidu Grafikaĵon 1). Dum la nombro da ekvivalentoj konstante kreskas, ĝi estas ĉiam malpli ol la nombro da "novaj" vortoj, almenaŭ dum la unuaj jaroj. Tio signifas, ke dum la dulingva infano evoluigas sian vortprovizon en ambaŭ lingvoj, ŝi/li ĉiam donas prioritaton al la nomado de novaj konceptoj en iu ajn el la du. Ŝi/li lasas la produktadon de ekvivalentoj ĝis posta okazo.




Grafikaĵo 1.
Ekakiro de substantivoj (——)
kaj la ekapero de iliaj
ekvivalentoj (- - - -)
ĉe dulingva infano.


(El Taeschner [1983])

4.2 En la kazo de trilingvaj infanoj, la situacio estas iom malsama. Necesas konstati, ke por ĉiu "nova" vorto, ili devas lerni ne nur unu, sed du ekvivalentojn. En ĉi tiu artikolo ni uzas la terminojn "unuaj" ekvivalentoj kaj "duaj" ekvivalentoj.

Malgraŭ tio ĉi, Gabrielo, same kiel dulingvaj infanoj, trapasis periodon en kiu li havis nur "novajn" vortojn. Vidu *Tabelon 1* kaj *Grafikaĵon 3.*



Grafikaĵo 2. Linioj montras la aĝojn en kiuj Gabrielo ekakiris vortojn en la angla (- - - -), Esperanto (. . . . .), itala (- . - . -) kaj mikslingve (_____)



Grafikaĵo 3. Linioj montras la verbigitajn konceptojn (_____) kaj ekvivalentojn de Gabrielo en du lingvoj (- - - -) kaj en tri lingvoj (-.-.-.-).

Tabelo 1.
La vortprovizo de Gabrielo en diversaj aĝoj.

Lingvo		1;11,30	2;5,3	2;8,20
Angla	Novaj	14	28	29
	Ekvivalentoj	–	6	16
	Entute	14	34	45
Esperanto	Novaj	1	19	39
	Ekvivalentoj	–	3	13
	Entute	1	22	42
Itala	Novaj	2	27	30
	Ekvivalentoj	–	5	17
	Entute	2	32	47
Mikslingvaj	Novaj	3	2	7
	Ekvivalentoj	–	1	2
	Entute	3	3	9
Sumo	Novaj	20	79	95
	Ekvivalentoj	–	12	48
	Entute	20	91	143

Praktike de la aĝo 1;7 ĝis 2;2 Gabrielo ne uzis ekvivalentojn. Dum ĉi tiu unua fazo, do, ekvivalentoj tute ne estis uzataj, kvankam Gabrielo aŭdadis plenkreskulojn uzi ilin. Ekzemple: (2;5,13)

- *G. kaj p-ino rigardas bildon de domo en ilustrita libro.*
  P-ino: That's a chimney. (Tio estas kamentubo).
  G: Camino[3] (It.: kameno, kamentubo)
  [G. ankaŭ fingromontras al la kameno en la ĉambro, kie ili troviĝas. P-ino nun rimarkas la kamentubon en bildo de trajno kaj montras ĝin al G.]
  P-ino: That's a chimney.
  G: Camino.

Ekvivalentoj unue aperis ĉirkaŭ la aĝo 2;2, alivorte sep monatojn post la periodo kiam Gabrielo produktis siajn unuajn vortojn en la angla.

Estas rimarkinde, ke ankoraŭ temis nur pri "unuaj" ekvivalentoj, t.e. estis nun du vortoj por la sama objekto aŭ ago, sed ankoraŭ ne tri. Ĉi tiu periodo daŭris ĉirkaŭ kvin monatojn, dum kiu troviĝas ekzemploj kun ekvivalentoj en la angla kaj la itala, la angla kaj Esperanto, aŭ la itala kaj Esperanto. En la sekva ekzemplo, la ekvivalentoj estas esprimitaj en Esperanto kaj la angla: (2;9,6)

- *P-ino prenas la teleron el la telerlavilo. G. volas helpi ŝin.*
  G.: Granda, granda![4]
  [Dum ĉi tiu periodo, Gabrielo nomis sin 'granda' kaj nomis sian malpli aĝan fraton 'malgranda'[5]. P-ino ignoras G-on, kiu klopodas kapti ŝian atenton.]
  G.: Big, Big! (Ang.: granda, granda!)

Ŝajnas, ke la trilingva infano trapasas trian fazon, en kiu aperas la duaj ekvivalentoj. Tio signifas, ke la infano nun povas nomi la saman objekton aŭ agon en ĉiuj el la tri lingvoj. (2;5,28)

- *G. rigardas ilustritan libron pri familio de katoj.*
  G.: Kato granda, kato piccolo[6]. (Piccolo = it. malgranda)

(2;7 6)

- *P-ro:* Ĉu Gabrielo estas granda aŭ malgranda?
  G.: Granda!
  P-ro: Kaj Fabiano?
  G.: Malgranda!

3 ka'mio 4 ganda 5 maganda 6 kato ganda kato pikko

(2;7, 14)

- *P-ino ludas kun Fabiano, la pli juna frato de G.*
  P-ino: Who's my little boy ? (Kiu estas mia malgranda knabo?)
  G. (fingromontras al Fabiano): Little boy, little boy.

Je la aĝo 2;7, la unuaj el la "duaj" ekvivalentoj ekaperis en la tri lingvoj, kaj kiel oni vidas per Grafikaĵo 3, ili konstante pli multnombriĝis. Ĝis la fino de la traktata periodo (2;9), kvankam ekvivalentoj jam ekaperis, la vortprovizo de Gabrielo ankoraŭ konsistis plejparte el novaj vortoj. Unuflanke, li jam komencis distingi la tri lingvojn, aliflanke li ankoraŭ uzis ilin kiel unu solan lingvan sistemon. Tio signifas, ke li agis sammaniere kiel dulingvaj infanoj: kelkfoje li produktis frazojn en unu sola lingvo, sed en aliaj okazoj li kunmiksis la tri lingvojn en la sama frazo, kiel en la jena ekzemplo: (2;7,24)

- *Dum la Esperanto-kongreso en Augsburgo G. kaj p-ino vidas Volksvagen de la germana polico. (La familio havas la saman aŭtomobilon).*

G.: Macchina daddy lampo.[7]
(Miksitaj it., ang. kaj Esp.: aŭtomobilo [de] paĉjo kun lampo.)
[Iom poste li vidas alian Volkswagen sen lampo.]
G.: Un altro macchina daddy lampo no![8]
(Alia aŭtomobilo [de] paĉjo lampo ne.)

4.3 Dum la infano trapasas ĉi tiujn tri fazojn en sia aktiva produktado de la lingvoj, ŝajnas ke ŝia/lia pasiva komprenado ne estas influata.

Kiam Gabrielo havis du jarojn (kaj do estis en la unua fazo de evoluigo de sia vortprovizo), oni testis lian komprenadon. La rezultoj klare montras, ke li povis kompreni ĉiujn frazojn diritajn al li en la angla kaj Esperanto. Oni testis lian komprenon de nur tiuj du lingvoj, ĉar en tiu periodo li ankoraŭ ne havis sufiĉajn kontaktojn kun parolantoj de la itala.

Por testi Gabrielon, oni donis al li dek ordonojn en la angla kaj Esperanto. Tiuj estas listigitaj en tabelo 2. Oni elektis vortojn, kiujn Gabrielo verŝajne komprenos, sed uzis ilin en nekutimaj kuntekstoj. La elektitaj vortoj estis kiel eble plej malsimilaj en la du lingvoj.

La patrino de Gabrielo testis lin en la angla, kaj lia patro en Esperanto. Kiam ili faris la ordonojn, ili evitis uzi gestojn, rigardojn aŭ alimaniere senvorte helpi. Antaŭ ol komenci la teston, ili metis la bezonatajn objektojn en videblaj pozicioj, sen ke Gabrielo vidu tiujn preparojn. La rezultoj montras, ke Gabrielo komprenis preskaŭ ĉion. En tiu periodo, en la aktiva vortprovizo de Gabrielo troviĝis nur 4 (t.e.7%) el la 60 vortoj uzataj en la dudek frazoj de la testo. Post naŭ monatoj, je la aĝo 2;9, li ankoraŭ aktive uzis nur 30% el ili.

7 makkja dadi ampo 8 unatto makkja dadi ampo nau

Ŝajnas evidente, do, ke en la du testataj lingvoj "la kapablo kompreni lingvon antaŭdatas la kapablon produkti ĝin". La notoj en la taglibro donas la impreson, ke lia scio de la itala evoluis en la sama maniero, kvankam oni ne sisteme testis tiun lingvon. Tio ĉi konfirmas la rezultojn de studoj pri la komprenkapablo de unulingvaj infanoj, kiel ekzemple tiu de Benedict (1979).

Eble oni povas klarigi kial komprenado antaŭdatas produktadon, se oni konsideras la malsamajn personecojn de infanoj, kiuj lernas paroli. Povus esti, ke Gabrielo estas "koncentrita" sur la "komprenado" pli ol "koncentrita sur la produktado" laŭ la distingo proponita de Nelson (1973).

Tabelo 2. **Enhavo kaj rezultoj de la testo pri komprenado.**

La simbolo x en la kolumno A signifas ke la reagoj de Gabrielo montris ke li komprenis ĉion.
La simbolo x en la kolumno B signifas ke li ŝajne ne komprenis la ordonon.

	Ordonoj	A	B
1. Angla	Put the trousers on the bed.	x	
Esperanto	Metu la pantalonon sur la liton.		x
2. Angla	Put the shoes in the cupboard.	x	
Esperanto	Metu la ŝuojn en la ŝrankon.	x	
3. Angla	Give the socks to Daddy.	x	
Esperanto	Donu la ŝtrumpojn al Paĉjo.	x	
4. Angla	Give the ball to Mummy.	x	
Esperanto	Donu la pilkon al Panjo.	x	
5. Angla	Take the wheelbarrow to the cat.	x	
Esperanto	Portu la ĉaron al la kato.	x	
6. Angla	Take the car inside.		x
Esperanto	Portu la aŭtomobilon internen.	x	
7. Angla	Take the bus off tbe chair.	x	
Esperanto	Prenu la aŭtobuson de la seĝo.	x	
8. Angla	Take the nappy off the bed.	x	
Esperanto	Prenu la vindotukon de la lito.	x	
9. Angla	Throw the book out of the window.		x
Esperanto	Ĵetu la libron tra la fenestro.	x	
10. Angla	Throw the apple out of the door.	x	
Esperanto	Ĵetu la pomon tra la pordo.	x	

Tio, kio estas interesa en ĉi tiu kazo, estas la diferenco inter la du procedoj. Ŝajnas, ke la komprenado evoluas samtempe en ĉiuj el la tri lingvoj, ĉar la infano komprenas ekvivalentajn terminojn de la komenco, dum tio ŝajne ne validas rilate al la produktado.

4.4 Lingva apartigo

Kiel la dulingva infano, la trilingvulo troviĝas en situacio, kie malsamaj homoj parolas malsamajn lingvojn. Ŝi/li devas decidi, kiun lingvon uzi, kaj lerni alparoli aliajn homojn en la ĝusta lingvo. La infano iom post iom ekkomprenas la fakton, ke x parolas x' dum y parolas y'. En la kazo de Gabrielo, tiu ekkompreno aperis preskaŭ samtempe kun la ekproduktado de ekvivalentoj. La tutunuaj ekvivalentoj en la tri lingvoj komencis aperi je la aĝo 2;7, sed estas notinde, ke Gabrielo ankoraŭ ne respondis al siaj kunparolantoj en la sama lingvo, per kiu ili alparolis lin.

Du-tri monatojn poste, li komencis fari tiun distingon, t.e. ekparoli al plenkreskuloj en ilia propra lingvo. Ekzemple: (2;8 6)

- *G. vidas bildon de biciklo ĉe la flanko de taso kaj diras en la angla al p-ino:*
  G.: Bicycle.[9]
  [Ĝis tiam li ĉiam uzadis nur la italan vorton bicicletta[10]*.]*

(2;8,14)

- *G. kaj lia prizorganto rigardas libron de fabeloj. Ili legas rakonton pri familio de ursoj. G. fingromontras al la ilustraĵo de la tri ursoj.*
  G.: Mama. papa. bimbo. (It.: panjo paĉjo bebo)

Antaŭ tiu okazo, Gabrielo estis leginta la libron nur kun sia patrino, kiu klarigis en la angla, sed li neniam estis rigardinta ĝin kun sia prizorganto. Tio signifas, ke li mem tradukis la nomojn de la ursoj en la italan.

Du tagojn poste, Gabrielo rigardis la saman libron kun sia patro. (2;8 16)

- *P-ro (fingromontras al unu el la bovloj de la tri ursoj):* Bovlo ...
  G. (finante la frazon de p-ro): ... de Panjo.

Ĉi tiu procedo okazis malrapide, kaj por difinitaj vortoj Gabrielo fiksiĝis je unu el la tri lingvoj dum ankoraŭ sufiĉe longa tempo.

Ekzemple, kelkajn tagojn post la fino de la diskutata periodo, Gabrielo komencis diri la anglan vorton *yes* (jes) al sia patrino. Tio kompletigis lian repertuaron de la tri paroj en la angla, Esperanto kaj la itala respektive: yes/no, jes/ne, si/no. Li ĝuste akordigis ilin al la lingvo de sia interparolanto, sed dum ankoraŭ unu-du monatoj, kiam li estis mense distrata, li ankoraŭ emis uzi la paron si (itala) kaj no (angla), sen rilato al la lingvo de la kunparolanto.

9 'baisi:ku: 10 bisi'ketta

La lingvaj ludoj kaj teoriaj komentoj de Gabrielo montras, kiel li aliris la taskojn distingi inter la lingvoj kaj ligi difinitan homon kun difinita lingvo.

Ŝajnas, ke ĉe la du- aŭ tri-lingva infano, la kapablo rezoni pri lingvoj en pli abstrakta maniero ekaperas samtempe kun la kapablo produkti ekvivalentojn.

Dum la periodo kiam Gabrielo komencis uzi ekvivalentojn, sed iom antaŭ ol li komencis uzi la ĝustan lingvon kun diversaj kunparolantoj, okazis jene: (2; 1, 29) La patro de G. kutime endormigas lin vespere tiel ke li veturigas lin en la aŭtomobilo. Dum tiuj okazoj G. estas ĉiam tre senstreĉita kaj parolas al si mem. Li ekzerciĝas pri ĉiuj ekvivalentoj kiujn li konas en siaj tri lingvoj.

- *G.:* Daddy: kamiono: Maria Elena: camion: Mummy: lorry.
  Daddy: aŭtobuso: Maria Elena: autobus: Mummy: bus.
  Daddy: biciklo: Maria Elena: bicicletta: Mummy: bicycle.
  Daddy: boato: Maria Elena: barca Mummy: boat. [12]

En la supra ekzemplo, oni klare vidas, kiel Gabrielo pripensas la vortojn kiujn diversaj homoj uzas por la sama objekto. Estas aparte interese, ke Gabrielo diras la vortojn en ĉiuj el la tri lingvoj, kaj ke li parolas al si mem — efektive, li estas pensanta kun voĉo. Kompreneble, en antaŭaj monatoj, tuj kiam ekaperis la tutunuaj ekvivalentoj, okazis ĉi tiaj "konversacioj" (2;1 16)

- *G. portas pijamon ornamitan per desegno de tenis-raketoj kaj -pilkoj.*
  G. (montrante la pilkojn al p-ino): Ball[13] (Ang.: pilko)
  P-ino: That's right, it's a ball. (Tio estas ĝusta, ĝi estas pilko).
  G.: Pilko.[14]
  P-ino: Pilko.
  G.: Pilko daddy.
  P-ino: Daddy says "pilko" . (Paĉjo diras "pilko")
  G.: Mummy ball.

Kiam li aĝis proksimume 2;6, Gabrielo lernis itallingvan infanan kanton *Giro-giro-tondo, casca il mondo*[15]. Li komencis kanti ĝin al si antaŭ ol endormiĝi. Kelkajn tagojn poste, li mem "verkis" du aliajn, unu en Esperanto kaj unu en la angla. La Esperanta kanto estis mamamomominto, anananononinto, kauaminto, kaj la angla (kiu evidente baziĝis sur la angla infana kanto Ding Dong Bell) estis ding dong bye. Poste, dum iom da tempo, li ĉiam kantis unu ajn el la tri.

12 dadi kamiono ma 'kamjon m^mi oi
dadi autobuso ma 'auto'bus m^mi b^s
dadi bisiko ma bisi'ketta m^mi baisi:ku
dadi boato ma bakka m^mi bot

13 bo
14 pikko
15 diotondo kakka-l-mondo

La fonologio kaj morfologio de liaj "verkaĵoj", precipe lia uzo de la Esperanta finaĵo -o, montras, ke li sisteme apartigis la tri lingvojn.

La informoj pri Gabrielo konfirmas la konkludojn jam prezentitajn en Taeschner (1983) kaj Taeschner kaj Cavosi (nun eldonata). Temas pri la frua produktado de ekvivalentoj kaj la frua kapablo distingi inter la lingvoj, kondiĉe ke ili estas prezentitaj al la infano en klara, konsekvenca maniero.

En la kazo de Gabrielo, do, liaj gepatroj kaj lia itala prizorganto ĉiam evitis uzi mikslingvajn frazojn. La gepatroj tamen ĉiam akceptis liajn diraĵojn en iu ajn lingvo dum la pli frua periodo, antaŭ ol li mem komencis uzi ekvivalentojn.

5. Bibliografio

Beardsmore, H.B. (1982): Bilingualism: Basic Principles, Multilingual Matters, Clevedon.

Benedict, H. (1979): Early lexical development: comprehension and production, Journal of Child Language, 2, 183-200.

Fantini, A.E. (1985): Language Acquisition of a Bilingual Child, College Hill Press, San Diego.

Kielhofer, B. kaj Jonnekeit, S. (1983): Zweisprachige Kindererziehung, Stauffenberg Verlag, Tüsingen.

Murrell, M. (1966): Language acquisition in a trilinqual environment: Notes from a case-study, Studia Linguistica, 1966. 20, 9-35.

Nelson, K. (1973): Structure and strategy in learninq to talk, Society for Research in Child Development Monographs, 38, No. 1-2 (series 149).

Ronjat, J. (1913): Le developpement du langage observé chez un enfant bilingue, Champion, Parizo.

Saunders, G. (1982): Bilingual Children: Guidance for the Family, Multilingual Matters, Clevedon.

Taeschner, T. (1983): The Sun is Feminine, Springer-Verlag, Berlino. Taeschner, T. kaj Cavosi, R. (1986): L'influenza dell'ambiente linquistico nel Processo di acquisizione di un lessico bilingue. Nun eldonata.

Volterra, V. kaj Taeschner, T. (1978): The acquisition and development of language by bilingual children, Journal of Child Language, 5, 311-326.

Konferenca raporto el Bratislavo

La 26-an Konferencon de ILEI en Bratislava, Slovakio dum la unua semajno de aŭgusto ĉeestis 94 personoj el 23 landoj en 6 kontinentoj (nur Antarktiko mankis!). Krome estis 18 gejunuloj el 8 landoj por la samloka kunligita gimnazio. La ĉeftemo de la Konferenco estis la vivo kaj la lingvo-instruaj teorioj de Komenio, kiu naskiĝis en 1592 en tiu ĉi parto de Eŭropo. Prelegojn pri la temo prezentis Vera BARANDOVSKA-FRANK el Paderborn kaj Miroslav MALOVEC el Brno. Speciala gast-preleganto, d-ro Ulrich LINS, vicprezidanto de UEA, prelegis pri "Internaciaj edukaj programoj kaj edukado kontraŭ naciismo". Atiljo A. ROJAS el Argentino prezentis pensigeman prelegon pri "Kolombo el Amerika vidpunkto". Aliaj prelegoj estis "Elementoj de instruado" de BARCSAY Zsuzsa el Hungario; "La pozicio de instruisto en la instruado de fremdaj lingvoj" de d-ino Marta MARTONOVA el Slovakio; "Esperanto kiel la unua fremda lingvo" de d-ro Ronald GLOSSOP el Usono; "Esperanta literaturo" de Eduard TVAROZEK el Slovakio; "Esperanto-instruado en Bialistoko" de Jaroslav PARZYZSEK el Pollando; "La instrumetodo de d-ro Lozanov" de Marin BACEV el Bulgario; "La respondeco de ILEI por la Esperanto-movado" de SZILVÁSI László el Hungario; "Similaĵoj kaj malsimilaĵoj inter Esperanto kaj la slovaka lingvoj" de prof-o Eduard GASINEC el Bratislavo; "La tuteco de la instruprocezo" de d-ro Edward SYMOENS el Belgio kaj KERESZTHEGYI Tivadar el Hungario.

La kunligitan gimnazion organizis kaj gvidis BARCSAY Zsuzsa. Ŝian raporton vidu sube. Same la protokolon pri la kunsidoj de la Komitato.

Unua Gimnazio de ILEI:

Internacia kaj amikeca

Esenca parto de la ILEI-konferenco estis la Gimnazio, t.e. internacia gimnazia semajno por 13—16-jaraĝaj geknaboj. Ili loĝis, manĝis, ekskursis kaj ĉiutage konversaciis kun la konferencanoj, tamen la 18 gejunuloj (el 8 landoj!) havis sian apartan programon, nome studhorojn (30 minutajn lecionojn) pri matematiko, literaturo, muziko, geografio, pri Komenio kaj iom pri kalkulado per sorobano.

Kio estis la utilo de tiu somera lernejo por la gejunuloj?

La gejunuloj povis interkonatiĝi kaj interamikiĝi, pasigi vere agrablan semajnon en internacia medio. Unuflanke plilarĝiĝis ilia horizonto: brito persone aŭdis pri la rumana lerneja sistemo, kroatino pri la sveda, ĉeĥoj, poloj, hungaroj (el landoj, kie Komenio vivis kaj multe agadis) interamikiĝis kun germanoj, do en la spirito de la interna ideo vivis tie la gejunuloj kaj espereble tio influos ilin ankaŭ estonte.

Ili aplikis Esperanton, lernante per ĝi diversajn temojn, serioze tamen en amuza formo. Krome, ili havis organizitajn kunagadajn ludojn (t.e. ne konkursajn, sed en kiuj ili reciproke helpas sin).

Kiel la Gimnazio integriĝis en la Konferencon?

La gekolegoj povis spekti kvar publikajn lecionojn: po unu pri matematiko (P. Arnaudov, BG), pri muziko (ges-roj R. kaj F.-G. Rössler, Germ.), pri geografio (S. MacGill, NZ/H) kaj pri E-literaturo (E. Tvarozek, CS), krome prezenton de kunagadaj ludoj (G. Tilleux, Belg.). Tiuj lecionoj stimulis bonan pedagogian kaj metodikan diskuton, do ne nur teorie sed ankaŭ praktike estis demonstrate, kiujn trajtojn de la instruista personeco kaj kiunivelajn fakajn sciojn postulas instruado; krome kiel oni povas motivi la geknabojn dum kaj inter la lecionoj por plej bone instigi ilin je aktiva partopreno en la lernprocezo.



Foto: BARCSAY Zsuzsa.

Laŭ la prijuĝo de la geknaboj mem la muzikaj kaj matematikaj instruhoroj gajnis la plej multajn poentojn. Belajn muzikajn programojn — kun fokuso je ritmo — ili prezentis dum kaj en la fino de la konferenco. Al la internacia vespero pluraj el ili kontribuis per literaturaj kaj aliaj programeroj, preparitaj jam antaŭ la gimnazia semajno.

Ĉiu el la gejunuloj estis unuflanke talenta, kapabla, inteligenta, aliflanke afabla kaj amikiĝema persono, kompreneble ĉiu memstara, aparta individuo kaj personeco. Pluraj el ili parolas kelkajn lingvojn. Estas promesige, ke ni havas tian junularon, kian reprezentas tiuj 18 geknaboj. Ni forte esperas, ke en la venontaj gimnaziaj semajnoj aliĝas (t.e. povos kaj emos veni) pluraj el ili, krome pluraj novaj gejunuloj, kun aĝo inter la Infana Kongreseto kaj la diversaj junularaj aranĝoj (IJK,IJS, IJF, IS ktp.)

Kelkaj geknaboj esprimis la deziron okazigi du-semajnan gimnazion. Tio, bedaŭrinde, havas obstaklojn, sed kiel kritiko — estas tre favora.

ILEI intencas eldoni la studmaterialon de la gimnazia semajno, por ke ĝi estu ne nur efemera travivaĵo por la partoprenintoj, sed ankaŭ komuna trezoro por apliki, aŭ analizi kaj plibonigi.

Ni esprimas tre koran dankon al la gekolegoj instruintaj en la Gimnazio kaj gratulas kaj salutas la partoprenintajn gejunulojn, kiuj elstaris ankaŭ per konscia, memvola disciplino.

BARCSAY Zsuzsa
Gimnazia direktorino.

Laŭ la statuto estraranoj havas trijaran oficdaŭron, sed por ne elekti ĉiujn el ili samtempe, estas alia regulo ke dum la unuaj tri jaroj de la statuto la estraranoj aranĝu, ke ili ne ĉiuj demisiu en la sama jaro. Ĉi-jare demisiis BARCSAY Zsuzsa kaj Bertil ANDREASSON. Andreasson rekanditatiĝis kaj estis reelektita. Barcsay konsentis daŭre labori rilate al la gimnazio kaj helpi en instruadaj aferoj, sed tamen ŝi rezignis pri estraraniĝo. Till DAHLENBURG estis elektita al tiu vaka ofico.

Estis anoncite ke la 27-a Konferenco de ILEI okazos en aŭ apud Valencio en Hispanio de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1993. Krome la estraro kunvenos en Budapeŝto de la 16-a ĝis la 28-a de marto 1993.

Paralele kun la Konferenco okazis Cseh-seminario grado "C" inkluzive diplomigan ekzamenon. La seminarion kaj ekzamenon gvidis SMIDÉLIUSZ Katalin el Hungario; partoprenis ĝin 5 personoj el 3 landoj.

La vesperaj distraĵoj estis tre memorindaj. Aparte impona estis loka grupo kiu prezentis slovakajn popol-dancojn kaj kantojn. Samvespere kantis infana ĥoro el Bulgario. Nin regalis ankaŭ konferencanoj kaj gimnazianoj.

Estis du ekskursoj. Marde aŭtobuso veturigis la vizitantojn al Trnava Modra kaj Pezinck por vidi vin-produktejojn kaj ceramikan muzeon. La ĵaŭda ekskurso estis perŝipa kaj peraŭtobusa vizito en Bratislavo kaj al Kastelo Devin.

Ronald GLOSSOP

Sinteza protokolo de la Komitato de ILEI en Bratislavo

Ĉi tio ne redonas ĉiujn unuopajn diskutojn, sed nur listigas la decidojn. La Komitato:

- Akceptis la aliĝpetojn de sekcioj en Kroatio kaj Rumanio
- Konsentis, ke la siatempa jugoslavia sekcio, kies sekciestro kaj agado baziĝis esence en Slovenio, transformiĝu al Slovena sekcio kaj invitas aliĝpetojn el aliaj regionoj de la siatempa Jugoslavio.
- Konstatis, ke la sekcioj en Japanio kaj Sud-Afriko ĉesis funkcii.
- Konfirmis la akcepton flanke de la Estraro de reprezentantoj por Albanio, Armenio, Aŭstralio, Islando, Kubo, Togolando kaj Ukrainio kun klopodoj akiri reprezenanton por Rusio kaj Jugoslavio.
- Akceptis la kasistan kaj estraran raportojn por 1991.
- Akceptis apartajn regularojn laŭ la skribaj tekstoj senditaj al la sekcioj: unu pri la proceduro proponi Honorajn Membrojn, alia por regi la aljuĝon de premio por la plej aktiva landa sekcio.
- Akceptis precizigojn al la Regularo de ILEI jene:

— unu komitatano rajtas porti maksimume du voĉojn, kondiĉe, ke tio estas skribe rajtigita de la koncerna sekcio.

— kvorumo por valide kunsidi estas unu kvarono de ĉiuj rajtigitaj komitatanoj. (Por ŝanĝi la Statuton estas triono, por malfondi la Ligon duono).

— kvorumo por skriba voĉdono estas unu duono de ĉiuj rajtigitaj komitatanoj; la Estraro rajtas voĉdonigi la komitatanojn tra la sekcioj.

- Akceptis la demisiojn de du estraranoj: s-ro Andreasson kaj s-ino Barcsay. La unua rekandidatiĝis kaj reelektiĝis, la dua ne rekandidatiĝis sed fariĝis estrara komisiito pri la Gimnazio kaj Instruado. Al la vaka loko estas elektita d-ro Till Dahlenburg (Germanio), bone konata kiel estrarano en la antaŭa estraro. Li respondecos pri instruado kaj ekzamenoj. S-ino Belosevic sekve ne plu respondecas pri ekzamenoj, sed akcpetas respondeci pri konferencoj kaj aranĝoj el organiza vidpunkto.
- Akceptis buĝeton por 1993 kun ensepzoj 72.500 SEK kaj elspezoj de 84.800.
- Rekomendis forte, ke la Gimnazio de ILEI fariĝu regula aranĝo kadre de la Konferencoj.

smg aŭg92

Eduka rezolucio akceptita de la Komitato de UEA en la 77a UK en Vieno:

La Komitato

agnoskas la gravecon de la nove lanĉita Gimnazio de ILEI, por evoluigi la instruadon de aliaj stud-temoj pere de Esperanto;

instigas ILEI daŭrigi sian eldonadon de bazaj lerniloj por diversaj cel- kaj aĝ-grupoj, kies ĵus aperinta elemento estas la dua kajero de *Tendaraj tagoj*;

gratulas pro la daŭra eldonado dum 22 jaroj de la valora revuo IPR;

salutas la transprenon de *Juna amiko* flanke de ILEI, por ke tiu internacia lernejana revuo ne pereu, sed eniru sian deknaŭan jaron de regula aperado;

notas, ke restas seneĥa la alvoko al Landaj Asocioj en la pasintjara eduka rezolucio proponi solvojn por la transpagaj baroj minacantaj la revuon — nome, ĉiuj solvoj ĝis nun kreitaj fontis el la redakcio. Ĉar tiuj solvoj restarigis apenaŭ kvaronon de la perditaj abonoj,

ripetas la alvokon al la Asocioj por la estonta jaro;

rekonas la rekordan rezulton de la UEA/ILEI ekzamenojn en 1991, kun 102 sukcesintoj el 18 landoj kaj dek sesioj; kaj

intencas trakti la proponatan regularon por la supera nivelo dum la vienaj kunsidoj, por ebligi ĝian starigon;

vokas al la Landaj Asocioj instigi siajn membrojn partopreni en enketo lanĉota de ILEI por determini la motivojn kaj manierojn de lernado de Esperanto, kies rezultoj ludos centran rolon en sub-temo de la UK en Valencio en 1993: "Kiuj lernas Esperanton en la mondo — kial kaj kiel ?"

konsentas kun ILEI pri la kerna rolo kaj nesufiĉeco de instruista trejnado. Laŭ la sekva klopodo proksi mume taksi la skalon de bezono —

Por atingi aŭ teni parolkomunumon de	ĉ. 1,000,000 homoj
Necesas ĉiujare logi al komencantaj kursoj	ĉ. 200,000 homojn
Por el ili rikolti parolantojn kaj uzantojn	ĉ. 40,000 homojn
Tio postulus konstantan popolon da instruistoj	ĉ. 10,000
Por teni tion stabila necesas trejni ĉiujare	ĉ. 500
kaj trejni aŭ trovi instruisto-trejnistojn jare	ĉ . 20.

la Komitato:

urĝas ILEI prepari serion da por-instruistaj kursoj divers-nivelaj kaj diverslokaj, kun la celo trejni en 1993 minimume kvindekon da instruistoj kaj en 1994 minmume centon.

invitas ĝin submeti al UEA buĝeton por la plenumo de tiu celo, indikanta la gradon de investo farebla de ILEI kaj partojn de la plano, kiuj ne povos esti mem-financaj, kaj laste

instigas ILEI prepari strategion por la trejnado de instruisto-trejnistoj.

ESPERANTO KIEL LA UNUA FREMDA LINGVO

Ronald J. Glossop, Profesoro de Filozofiaj Studoj
Southern Illinois University at Edwardsville, IL 62026 U.S.A.
(Suda Ilinoja Universitato en Eduardsvilo, IL 62026 Usono)

Por la 26-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Bratislavo, Ĉeĥoslovakio

La ideo ke Esperanto devus esti la unua fremda lingvo por junuloj certe ne estas nova ideo. Mi komencu per cito de artikolo de KOVÁCS Márta en la *Internacia Pedagogia Revuo* por printempo, 1989.

„La ideo instrui Esperanton kiel unuan fremdan lingvon leviĝis jam komence de la dudekaj jaroj. Ĝis la sesdekaj jaroj elformiĝis la teorio, laŭ kiu la instruado de Esperanto kiel unua fremda lingvo donas pli da rezultoj ol tio de iu ajn alia nacia lingvo; ĝi plifaciligas la alproprigon de pluaj fremdaj lingvoj; ĝi helpas pli profunde kompreni la strukturon de la gepatra lingvo; ĝi plibonigas la rezultojn de instruado de aliaj studobjektoj (ekz. geografio, historio); ĝi edukas je estimo de kulturo kaj moroj de aliaj popoloj, je internacia kunlaboro." (IPR Jarkolekto 19 (1989), n-ro 2, p. 1.) Do, kial mi denove volas paroli pri ĉi tiu afero? Ĉar mi opinias, ke ni devus repensi la implicojn de ĉi tiu punkto ke Esperanto devus esti la unua fremda lingvo. Se junaj personoj lernos Esperanton antaŭ iu ajn alian fremdan lingvon, je kiu aĝo ili devus komenci studi ĝin? La ĝusta respondo ŝajnas esti, kiam ili havas ok aŭ naŭ aŭ dek jarojn.

Sed kio estas la nuntempa situacio? Ŝajnas al mi, ke speciale en Eŭropo, multe de la instruado de Esperanto nun okazas kiam la lernantoj havas 14 aŭ pli da jaroj. Ĉi tiuj lernantoj studas Esperanton en interes-kluboj, kiuj kutime kunvenas dum semajnfinoj aŭ post la normalaj horoj por lernej-instruado. Esperanto estas kiel hobio por ili. Ili ofte jam studis almenaŭ unu alian fremdan lingvon dum la normalaj lernej-horoj. Ĉi tiuj gelernantoj povas ĉeesti tendarojn kaj specialajn kunvenojn por dekkelkjaruloj dum semajnfinoj kaj dum la somero. Kaj tiaj agadoj estas bonega allogo al nia movado. En Eŭropo viaj junaj esperantistoj estas la estontaj gvidantoj de la tuta Esperanto-movado. Ni en Usono kaj aliaj partoj de la mondo devus fari la saman. En Usono ni havas nenion por niaj esperantistaj dekkelkjaruloj. Fakte, ni havas preskaŭ neniujn junulojn, kaj ni devas ŝangi tiun situacion. Probable ni devos plani tendarojn en Meksikio aŭ Kebekio, por ke estu vera kaj natura bezono por lingvo krom la angla.

Ni revenu al la situacio ĉi tie en Eŭropo. La nuntempa unuiĝo de Eŭropo provizas grandan novan ŝancon por Esperanto. Ŝajnas al mi, ke la reunuiĝo de Germanio helpos haltigi la disvastigon de la angla en Eŭropo. Grava demando en ĉiuj eŭropaj landoj estas, kiujn fremdajn lingvojn infanoj devus studi? (Tio

estas grava demando ankaŭ en grandaj angla-parolantaj landoj kiel Usono kaj Aŭstralio sed pro tre malsama kialo.) Eble iam la landaj registaroj vekiĝos kaj postulos, ke siaj lernejoj instruu Esperanton kiel la unuan fremdan lingvon al ĉiuj infanoj. Aŭ eble la gvidantoj de la Eŭropa Komunumo postulas tion.

Ordinare kiam oni pensas pri la instruado de infanoj oni pensas nur rilate al la normalaj horoj de lernado en la lernejoj. Oni emas atendi decidon de la registaroj por ekstarti la instruadon de Esperanto en la lernejoj. Sed ni devas havi alian planon kiel agi. Ni bezonas pensi pri kiel ni mem nun ekster la lernejoj povos allogi 8–10 jaraĝajn infanojn al Esperanto.

Unu ebleco estas aranĝi instrui (neformale) tiujn infanojn, kiujn ni hazarde konas, infanojn, kiuj estas parencoj, kiuj loĝas apud ni, kiuj estas idoj de niaj amikoj, kiuj apartenas al iu grupo kiun ni konas (ekzemple, preĝejo aŭ apuda lernejo aŭ bibloteka grupo aŭ infanĝardena grupo, kaj tiel plu). Unu projekto, kiu povas helpi vin fari ĉi tion estas *Mondo-Rondo*. Eble vi jam aŭdis pri *Mondo-Rondo*. Vidu la anoncojn sur la eksteraj malantaŭaj kovriloj de *Esperanto* por Januaro 1992 kaj por Februaro 1992 kaj la artikoleton en *Internacia Pedagogia Revuo*, Jarkolekto 22 (1992), n-ro 1, p. 12. Nova projekto ellaborita de Charlotte KOHRS, la fondintino de *Infanoj ĉirkaŭ la mondo* kaj verkistino de belaj kantoj por infanoj kaj de la libreto *Ni esploru la mondon* kaj nun de nova iomete pli facila libreto *La Bela Planedo*.

Ŝi verkis novan strofon al la melodio *Frato Johano* [Frère Jacques] kiun mi ĉi tie donas al vi, por ke vi povu instrui al viaj lernantoj:

Sur la Tero, bela Tero, loĝas nio, kantas ni.
Kune sur la Tero, unu familio, famili', famili'.

La ideo de *Mondo-Rondo* estas ke esperantistoj, kiel ni, povas esti lingva ponto inter malgranda grupo de infanoj en nia lando (eble nur du-tri) kaj aliaj infanoj en la cetero de la mondo. Vi kaj via malgranda grupo sendos kaj ricevos tra la tuta mondo multajn bildkartojn skribitajn Esperante. Ne necesas formale instrui infanojn dum longa tempo antaŭ ol ili komencos sendi kaj ricevi perpoŝte bildkartojn. Oni esperas, ke la lnfanoj baldaŭ volos lerni Esperanton, por ke ili povu pli bone kompreni kaj uzi la lingvon. Vi povos uzi la libreton *La Bela Planedo* aŭ aliajn materialojn por helpl ilin lerni kiel legi kaj skribi kaj prononci la lingvon.

Mi ricevis raportojn de Charlotte Kohrs kaj ankaŭ de nia kolego en ĉi tiu organizajo, Ton VERWOERD el Nederlando, ke ĉi tiu projekto funkcias bone. Charlotte indikis en letero de la 9-a de julio 1992, ke la baza grupo en San-Diego jam ricevis 87 bildkartojn de infanaj grupoj en 26 landoj. Ton skribis al mi je la 27-a de junio 1992 jene: "Amason da bildkartoj ni interŝanĝis (pli ol 30 ricevitaj), kaj el tiu korespondado naskiĝis partoprenoj en internaciaj ekspozicioj, individuaj kontaktoj, eĉ vizito al Heemskerk" de dek personoj el Esper-

anto-rondo en Biesenthal, Germanio. Do mi tre rekomendas al vi, komencu Mondo-Rondon por kelkaj infanoj, kiujn vi konas.

Ton indikis ankaŭ, ke ni bezonas daŭran kontakton kun aliaj infanaj esperantistoj por movi preter la interŝango de la bildkartoj al okazoj por interparolado Esperante, eble per infankunvenoj . Mi tute konsentas, sed planoj por tiaj infankunvenoj devos esti ellaborataj de la koncernaj instruistoj. Per leteroj ili povos ekscii kiam kaj kie ili povus kunveni. Okazigi tiajn infankunvenojn estas alia projekto, kiun mi tre rekomendas. Ĉiu renkontiĝo devus instigi la infanojn plibonigi sian Esperanton.

Sed ne ĉiam necesas, ke ni mem aranĝu ĉi tiujn kunvenojn por infanoj. Aliaj eblecoj por infankunvenoj jam ekzistas. En la lasta numero por 1991 de *Internacia Pedagogia Revuo* estis artikolo verkita de Miroslav MALOVEC ("Kiel Komunikos la Unuigita Eŭropo?" Jarkolekto 21 (1991), N-ro 4, p. 16,18.) en kiu li informis nin pri franca instruisto, Michel **FEUCHOT**, kaj la organizaĵo *Societo de la Infanoj de Eŭropo*, kiun tiu fondis. Kvincent geknaboj el 12 landoj ĉeestis kunvenon de tiu organizaĵo en Brno, Ĉeĥoslovakio en junio 1991. Sinjoro Malovec raportis, ke nur unu knabino ĉe la konferenco scipovis Esperanton, sed sinjoro Feuchot mem parolis al ŝi Esperante! Sinjoro Malovec rekomendas, ke ni Esperantistoj sendu niajn Esperanto-parolantajn junulojn al tiaj internaciaj renkontiĝoj de infanoj por demonstri la valoron de Esperanto. Mi tute konsentas. Bedaŭrinde, tiu artikolo ne donas informon al la leganto pri iu ajn estonta kunveno de tiu societo. Ŝajnas al mi, ke ĉi tio estas granda ŝanco por ni, kaj ne eĉ necesas, ke ni planu la kunvenojn. Ni nur devos certigi ke niaj Esperanto-parolantaj junuloj ĉeestu. La diversaj Mondo-Rondaj grupoj povus plani renkonti unu la alian ĉe ĉi tiuj kunvenoj de la infanoj de Eŭropo. Kompreneble ili devus havi informilojn pri Esperanto por povi distribui ilin al aliaj infanoj, kiuj eble montros intereson pri Esperanto. Ankaŭ *Juna amiko* kaj *Internacia Pedagogia Revuo* kaj aliaj Esperantaj magazinoj devus anonci la detalojn pri la okazontaj kunvenoj de la Societo de la Infanoj de Eŭropo kaj instigi junajn Esperantistojn ĉeesti. Kia ŝanco por ni! Ni devas ne maltrafi ĝin.

Jen flank-punkto. Se ni povus instrui Esperanton kiel unuan fremdan lingvon al granda kvanto de infanoj, ni havus novan argumenton kontraŭ tiujn, kiuj konstante demandas, kiom da personoj povas uzi Esperanton en komparo kun la kvanto, kiu uzas kelkajn aliajn lingvojn? Ni povus respondi kun nia propra demanda argumento: kiom da infanoj povas uzi aliajn lingvojn en komparo kun la kvanto, kiu povas uzi Esperanton? Niaj infan-Esperantistoj devas partopreni en la Eŭropaj infankunvenoj por eksponi ĉi tiun punkton.

Mi nun volas disdoni alian ideon al vi. Mi ne bone scias la situacion en Eŭropo, sed en Usono estas multe da intereso pri tergloba (aŭ tutmonda) edukado. Mi rimarkas, ekzemple, ke la instruistoj de la naturdotitaj kaj talentaj infanoj kutime nun havas apartan sekcion por tergloba pedagogio. Ŝajnas al

mi, ke la temo de tergloba edukado estas grava al ni. Tiu kampo provizas novan ŝancon por ni, speciale ĉar al ni haveblas la bonaj libretoj verkitaj de Charlotte Kohrs titolitaj *La Bela Planedo* kaj *Ni Esploru la Mondon.* Ili estas perfektaj por terglobla edukado, kaj la infanoj samtempe lernos la mond-lingvon. Do, ni devas kontakti tiujn instruistojn interesitajn pri tergloba edukado kaj informi ilin pri Esperanto kaj ĉi tiuj libretoj.

Rimarku ke nova strategio estas havebla al ni. En la pasinteco ni plejparte penis interesigi la instruistojn de fremdaj lingvoj pri la instruado de Esperanto. Malmultaj el ili estas amikaj al Esperanto; plejparto el ili malamas Esperanton. Ill vidas ĝin konkuranton al la naciaj lingvoj, kiujn ili instruas. Ili ne volas helpi nin. Sed ĉe la instruistoj de tergloba edukado, la situacio kutime estas tre malsama. Ofte ili ne aparte interesiĝas pri lingvoj, sed tamen ili povas vidi ke ekzistas tergloba lingvoproblemo. Ili kutimas vidi la mondon kiel unuon, kaj sekve ili povas rimarki terglobajn problemojn kiel la mondan lingvoproblemon. Mi opinias, ke ili pli probable helpos nin ol la instruistoj de fremdaj lingvoj.

Rilate al ĉi tiu situacio permesu min fari akcesoran punkton. Estas grava malsamo inter inter-naciismo kaj terglobismo, sed multaj personoj ne konscias pri tio. Ĉe inter-naciismo la fokuso por atento estas la apartaj naciaj landoj kaj la rilatoj inter ili kaj iliaj registroj kaj iliaj kulturoj. Ĉe terglobismo la fokuso por atento estas la tuta mondo kiel unu komunumo. Ekzistas inter-naciaj organizaĵoj kiel la Unuiĝinta Naciaro kaj la Internacia Kortumo de Justeco en kiuj la naciaj registaroj interagas unu kun la alia. Tiaj organizaĵoj uzas naciajn lingvojn kaj interpretistojn kaj tradukistojn. Male, tergloba politika organizaĵo estus monda registaro por la tuta monda komunumo kun monda parlamento, monda administranto, monda polico, kaj monda kortumo por individuoj, kiuj malobeas la mondajn legojn. Ĉe lingvoj la internaciistoj volas uzi kaj instrui la diversajn naciajn lingvojn, sed la terglobisto j volas uzi unu tergloban lingvon kiel Esperanton. Pro tio, mi opinias, ke ni devus nomi Esperanton ne "la internacia lingvo" sed prefere "la tergloba lingvo." Mi esperas, ke vi nun komprenas pli bone kial estas, ke kvankam la instruistoj de la naciaj lingvoj ofte ne estas amikoj de Esperanto, tamen ni povas anticipi, ke la adeptoj de tergloba edukado estos niaj amikoj.

Kompreneble, ni devas ankoraŭ peni persvadi la estrojn de la edukaj sistemoj instrui Esperanton kiel la unuan fremdan lingvon en lernejoj. Ni devas informi ilin pri la eksperimentoj jam faritaj, kiuj montras, ke lernantoj povas lerni Esperanton pli rapide ol aliajn lingvojn, ke la lernantoj de Esperanto lernos pli rapide aliajn fremdajn lingvojn, ke la lernantoj de Esperanto plibonigos la uzon de sia propra lingvo, kaj tiel plu. Ni ankaŭ bezonas pli da eksperimentoj por eĉ pli bone pruvi ĉi tiujn punktojn. Ni bezonas daŭre argumenti, ke Esperanto devus esti instruata al infanoj antaŭ ol ili komencas studi aliajn fremdajn lingovjn. Ĉi tiu argumento estas aparte bona en tiuj situ-

acioj kie la denaska lingvo ne uzas la latinajn literojn. Fine, niaj bonaj argumentoj kaj pruvoj gajnos. Tio estos tre bona tago por la infanoj tra la tuta mondo. (Vidu ekzemple Elisabetta FORMAGGIO, "Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en la fremdlingvoinstruado, " Internacia Pedagogia Revuo, Jarkolekto 20 (1990) , N-ro 1 , p.1 ; Duncan CHARTERS, "Teaching Culture: The Global Context" (prezentajo al All-California Conference of Esperanto en Sacramento, California, 26-a Marto 1988), pp. 45-52; Edward SYMOENS, La soci-politika, pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto (Rotterdam; Universala Esperanto-Asocio, Esperanto-Dokumentoj, 23E, 1986), pp. 25-28; Helmut SONNABEND, "Esperanto en la sistemo de fremdlingva instruado, IPR, Jarkolekto 14 (1984), N-ro 3, pp. 67-68; kaj KOVÁCS Márta, "Kvinlanda Pedagogia-Didaktika Eksperimento, " Internacia Pedagogia Revuo, Jarkolekto 19 (1989), n-ro 2, pp. 1-8.)

BIBLIOGRAFIO

CHARTERS, Duncan, "Teaching Culture: The Global Context" (Instruante kulturon: la globala kunteksto) prezentajo al la Tut-Kalifornia Konferenco de Esperanto en Sacramento, California, 26-a Marto 1988. Por detaloj, kontaktu D-ron Charters, Division Head, Languages and Literature, Principia College, Elsah, IL 62028-9799, Usono.

FORMAGGIO, Elisabetta, "Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en la fremdlingvoinstruado, " Jarkolekto 20 (1990), N-ro 1, pp. 1-9.

KOVÁCS, Márta, "Kvinlanda Pedagogia-Didaktika Eksperimento," Internacia Pedagogia Revuo, Jarkolekto 19 (1989), N-ro 2, pp. 1-8.

MALOVEC, Miroslav, "Kiel Komunikos la Unuigita Eŭropo?" Internacia Pedagogia Revuo, Jarkolekto 21 (1991), N-ro 4, p. 16.

SONNABEND, Helmut, "Esperanto en la sistemo de fremdlingva instruado, " Internacia Pedagogia Revuo, Jarkolekto 14 (1984), N-ro 3, p 65-72.

SYMOENS, Edward, de Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, Esperanto-Dokumentoj,23E,1986.

Niaj mezaj paĝoj prezentas la enketilon, kiun ni distribuis en la UK en Vieno en 200 ekzempleroj, el kiuj ni ricevis ĉ. 50 plenskribitajn. Ni volas pli da respondoj, sed nur de tiuj, kiuj ankoraŭ ne respondis! Ni kompresas kvanton, sekciestroj ricevos ekstrajn.

La ĉefa kongresa temo de la UK estos "Klerigo por la dudekunua jarcento" kaj ĝin reĝisoros UEA kaj ILEI kunlabore (kapablaj gvidantoj/prelegantoj serĉataj!) La enketilo rilatas al interna sub-temo, kiu havos propran sesion en kiu la rezultoj estos prezentataj kaj diskutataj.

Tendaraj tagoj

kajeroj unu kaj du

nun haveblaj en la libroservo de ILEI kune kun multaj aliaj interesaj libroj

Subtenu la Ligon — akiru viajn librojn en nia liga libroservo!



Ne antaŭpagu la mendojn. Ni sendos fakturon kun la libroj. Fakturoj estos en nederlandaj guldenoj kaj svedaj kronoj. Nederlandajn pagojn oni povas fari al la konto de ILEI, ilek-a ĉe UEA. Svedkronajn pagojn oni povas fari al nia kasisto. La fakturoj donos plenajn pag-detalojn. Se vi nepre bezonas fakturon en alia valuto, bv. tion indiki.

Niaj prezoj *inkluzivas* la surfacajn ekspedokostojn. Se vi volas aerpoŝtan liveron, bv. aldoni 10%. Ni petas pagojn ene de 30 tagoj.

SUBTENU NIAN PROPRAN LIBROSERVON — VI APOGOS LA LIGON!

MENDILO POR HUNGARAJ LIBROJ

Sendu al: ILEI, Esö u 7 III, H-1034 Budapest, Hungario.

		Kvanto	Sumo
Perfekta civitano (Szátmari)	20 gld.	_____	_____
Adolesko (Vaha)	18 gld.	_____	_____
Hura (Baghy)	20 gld.	_____	_____
Hungara antologio (eld. Corvina)	36 gld.	_____	_____
Tutmonda Sonoro, I kaj II (Kalocsay)	36 gld.	_____	_____
Enciklopedio de Esperanto	36 gld.	_____	_____
Sekretaj sonetoj	8 gld.	_____	_____
Amuza legolibro de Esperanto (Lienhart)	12 gld.	_____	_____
Baza legolibro por komencantoj (red. Benczik)	10 gld.	_____	_____
Laŭta vekhorloĝo, La (MacGill)	14 gld.	_____	_____
Ĉu vi konas la teron?	8 gld.	_____	_____
Perkomputila tekstprilaboro.(red. Koutny)	8 gld.	_____	_____
	SUMO:		_____

La prezoj inkluzivas surfacajn sendokostojn.

Bv. sendi la librojn kun fakturo en guldenoj al:

Nomo: _____

Adreso: _____

_____

Subskribo: _____ Dato: _____

ilei: internacia ligo de esperantistaj instruistoj

enketilo pri instruado

prepare al temo diskutota en la Universala Kongreso en Valencio en 1993:

"Kiuj lernas Esperanton en la mondo: kiel kaj kial?"

Ĉi tiu anonima demandilo celas liveri konkretan bazon por diskutoj dum la UK en Valencio. Ni petas vian kunlaboremon. Bv. plenskribi ĝin — sed nur se vi ne jam tion faris en la UK en Vieno! Tiukaze, bv. pludoni ĝin al iu, por kiu ĝi estas nova. Bv. resendi ĝin al: ILEI, s-ino Barcsay Zsuzsa, Bem Rakpart 25B, H-1011 Budapest, Hungario.

Demandoj kun spaco _____ permesas vortan aŭ ciferan respondon.

Demandoj kun kestoj ☐ bv. respondi per hoko en nur unu kesto.

Demandoj kun krampoj ( ) permesas indiki ciferan vicordon de faktoroj. Indiku la plej gravan per "1", la duan per "2" ktp.

Pluraj demandoj havas liberan linion fine. Tie vi rajtas mencii alian faktoron aŭ respondon, se neniu el la proponitaj taŭgas. Aŭ vi rajtas tie enskribi komenton pravigante aŭ nuancante vian elekton.

1. BAZAJ INFORMOJ:

1. Loĝlando: _____ 2. Sekso: ☐ Viro ☐ Virino

3. Aĝo: ☐ ĝis 20; ☐ 21—40; ☐ 41-60; ☐ 61-70; ☐ pli ol 70.

4. Familia stato: ☐ vivanta sola ☐ kunloĝanta

5. Profesio: _____

6. Daŭro de esperantisteco:

☐ ĝis du jaroj ☐ 2-5 jaroj ☐ 5-10 ☐ 11-20 ☐ pli ol 20.

7. Laŭ kiu maniero vi unue eksciis pri Esperanto:

☐ ĵurnal-artikolo ☐ afiŝo ☐ anonco pri kurso ☐ el libro

☐ en lernejo ☐ en alia institucio ☐ de konato

Alia aŭ komento: _____

8. Kio estis la ĉefa faktoro en via decido eklerni la lingvon? (1 ĝis 8)

( ) por korespondi ( ) por vojaĝi ( ) por koni ĝian literaturon
( ) por ĉeesti renkontiĝojn ( ) intereso pri lingvoj
( ) por ekkoni eksterlandanojn ( ) por koni fremdajn kulturojn
( ) por kontribui al la monda paco kaj interkompreniĝo

Alia aŭ komento: _____

9. Kiu(j) estas via(j) denaskaj lingvoj(?): _____

Kiujn ceterajn lingvojn vi kapablas paroli bone:

_____

Kiujn ceterajn lingvojn vi povas legi aŭ paroli modere?

_____

10. VIA LERNADO DE ESPERANTO

11. Dum kiom da tempo vi sisteme aŭ formale studis la lingvon?

_____ jarojn, _____ monatojn.

12. Kiumaniere vi eklernis la lingvon?

☐ Ĉeesta kurso; ☐ gramatika ☐ rekt-metoda (paroliga)

☐ koresponda kurso ☐ mem-studado ☐ radia aŭ televida kurso

Alia aŭ komento: _____

13. Se vi partoprenis kurson, kiel vi pritaksis ĝin?

☐ elstare bona; ☐ tre bona; ☐ bona; ☐ malforta; ☐ misa.

14. Kiujn lingvojn vi lernis pli frue ol Esperanto: _____

15. Kiujn lingvojn vi lernis post Esperanto: _____

16. Kiujn influojn vi rimarkis (helpajn, malhelpajn) inter via lernado de Esperanto kaj tiuj aliaj lingvoj:

_____

17. Kiuj estas viaj motivoj por daŭra okupiĝo pri Esperanto? (1-8)

( ) kontribuo al pli bona mondo ( ) kono de homoj el aliaj landoj

( ) intereso pri lingvoj ( ) sento de aparteno al E-komunumo

( ) legado de libroj k revuoj ( ) personaj rilatoj kun proksimuloj

( ) vojaĝado ( ) utileco en profesio aŭ ŝatokupo.

18. Kiel vi ĝenerale pritaksas la nuntempajn kursojn de Esperanto:

☐ tre bonaj ☐ bonaj ☐ adekvataj ☐ eksmodaj ☐ maltaŭgaj

19. Kiel vi pritaksas la ĝisnunan enplektadon de kurs-finintoj en la movadon aŭ en aktivan uzadon de la lingvo?

☐ tre sukcesa ☐ sukcesa ☐ modera ☐ ne-multa

☐ malsufiĉa ☐ preskaŭ nula.

20. ESTONTA INSTRUA STRATEGIO:

21. Kiel vi taksas instruadon el inter ĉiuj movadaj laborkampoj:

☐ absolute la plej grava; ☐ inter du-tri plej gravaj

☐ unu el multaj bezonantaj atentoj; ☐ ne-grava

22. Kiom gravas la oficiala instruado, kontraste al libervola.

☐ decidige grava; ☐ grava;

☐ dezirinda sed ne nepra ☐ evitinda.

23. Al kiaj lernejoj ni dediĉu niajn ĉefajn instruajn fortojn:

☐ infan-ĝardenoj (2-5j.) ☐ elementaj lernejoj (5-13j.)

☐ gimnazioj k.s. (14-18j.) ☐ universtatoj ks. (18-25j.)

☐ instruistaj trejnejoj ☐ plenkreska edukado.

24. Kiaj kursoj liveros la plej taŭgajn rezultojn?

☐ gramatike bazitaj ☐ Cseh-metodaj

☐ situaci-komunikaj ☐ vidbendaj aŭ komuptilaj

Alia (aŭ komento): _____

25. Kion ni emfazu en nia varbado de novaj kursanoj (1 ĝis 8):

( ) kontribuo al pli bona mondo ( ) kono de homoj el aliaj landoj

( ) interesa lingva fenomeno ( ) eblecoj aparteni al E-komunumo

( ) legado de libroj k revuoj ( ) personaj rilatoj kun proksimuloj

( ) vojaĝado ( ) utileco en profesio aŭ ŝatokupo.

Alia aŭ komento: _____

26. Por kontentigi la bezonojn de la kursfinintoj, al kiu ni dediĉu pli da energio?

☐ evoluigo de la Esperanto-kulturo kaj komunumo

☐ kreskigo de la apikebloj en la ekstera mondo

Alia aŭ komento: _____

27. Kiel ni prefere aliru la trejnadon de instruistoj?

☐ ni organizu mem en Esperanto-centroj kursojn.

☐ ni konvinku eduk-instancojn enkonduki trejnadon de E-instruistoj per siaj oficialaj rimedoj.

☐ ni aliru internaciajn instancojn, kiel Unesko, EK, ktp.

Alia aŭ komento: _____

28. Kiuj aspektoj de la instrua procezo estas laŭ vi la plej gravaj:

☐ instrui la legadon kaj skribadon

☐ instrui la recito-kapablon de poemoj kaj literaturaĵoj

☐ instrui la kapablon konversacii (aŭskulti kaj paroli)

☐ kreskigi en la lernantoj pozitivan sintenon al la lingvo

29. Rangigu la sekvajn celojn por nia instruado laŭ graveco (1 ĝis 9):

( ) akiri rajtojn por oficiala instruado en ŝtataj lernejaj sistemoj

( ) krei reton de bone trejnitaj instruistoj kaj instruisto-trejnistoj.

( ) krei pozitivan internaciecan etoson en la Esperantaj klasoj

( ) establi praktikajn interŝanĝajn projektojn inter E-klasoj

( ) estigi fortajn ligojn inter E-klasoj kaj la movado, precipe la junulara agado.

( ) direkti inform-kampanjojn al gepatroj kaj instruistoj pri la kulturaj kaj internaciaj eblecoj de la lingvo.

( ) establi norman ekzamen-sistemon por kontroli la kvaliton de la instruado.

( ) disponigi bonajn bazajn lernilojn (librojn, kasetojn, ktp.) por la diversaj aĝ- kaj cel-grupoj

( ) emfazi en la instruado transliman toleremon kaj interkompreniĝon kaj konon de fremdaj kulturoj

DANKON PRO VIA KUNLABORO!

ilei— internacia ligo de esperantistaj instruistoj

LIBROSERVO DE ILEI

Sendu al: ILEI, Esö u. 7 III, H-1034 Budapest (92/3)

Nomo:.....

Adreso kien sendi la librojn: .....

.....

Mi mendas la sekvajn titolojn:

	Kvanto	Sumo
Tendaraj tagoj, kajero 1. 12 NLG/ 36 SEK	_____	_____
Tendaraj tagoj 1, ekde 5 ekz. (9NLG/27 SEK)	_____	_____
Tendaraj tagoj, kajero 2. 15 NLG/ 45 SEK	_____	_____
Tendaraj tagoj 2, ekde 5 ekz. (10 NLG/30 SEK ekde 5)	_____	_____
La danĝera lingvo, Lins. 50 NLG/150 SEK	_____	_____
Slovakia antologio (528p.) 20 NLG/ 60 SEK	_____	_____
Anekdotoj pri famaj homoj (60p.) 13 NLG/ 40 SEK	_____	_____
Spegulaj E-insignoj el Kievo. 2 NLG/ 6SEK	_____	_____
Jarkolekto de *Juna amiko* por 1992. 10 NLG / 30 SEK	_____	_____
Abono *Juna amiko* por 1993 (32 paĝa). 16 NLG/ 50 SEK (rabatoj por kvantoj, nacilingvaj kotizoj, vidu paĝon 33)	_____	_____
'Valoro de Esperanto' (Symoens, angle) 6 NLG/ 20 SEK	_____	_____
'Valoro de Esperanto' (Symoens, france) 6 NLG/ 20 SEK	_____	_____
Kvar jarcentoj — Komenio (38p.) 12 NLG / 36 SEK	_____	_____
Sola en sunsubiro (Tvarozek 60p.) 6 NLG / 18 SEK	_____	_____
Ĉernobil (Ŝĉerbak) 389p. 8 NLG/ 24 SEK	_____	_____
Impeto 91 (Progreso) 246p. 6 NLG / 18 SEK	_____	_____
SUMO:	_____	_____

Subskribo:..... Dato:.....

Speciala oferto de libroj el Hungario

ILEI faras specialan oferton al siaj membroj, en kunlaboro kun Hungaria Esperanto-Asocio. Ĝi devas transloki siajn librostokojn al malpli granda kelo, kaj sekve ofertas plurajn interesajn titolojn kun rabatoj ĝis 40 %. Krome, la surfacaj sendokostoj estas inkluzivitaj en la prezoj. Vi ricevos fakturon en guldenoj pagenda ene de 30 tagoj al la konto de HEA ĉe UEA.

Ĉi tiu mendilo troviĝas sur la sama elprenebla folio kiel tiu de la ILEI-libroservo. Vi rajtas sendi ambaŭ al la donita adreso de ILEI. Ni apartigas la mendilojn kaj transdonos viajn HEA-mendojn al ili. Sole HEA respondecas pri la ekspedado kaj fakturado de tiuj mendoj. Se necesas posta korespondado pri tiuj mendoj bv. direkti ĝin al HEA, pf 193, H-1368 Budapest, Hungario.

Ĉi tiu oferto validas ĝis la fino de 1992, do kaptu la okazon nun!

ILEI — PROVANTA SERVI PLI AMPLEKSE LA INSTRUISTARON

Instrui komunike: Poprad, Slovakio, 6-9 nov. 1992

SKEMO POR LA INTENSIVA KURSO POR INSTRUISTOJ

Vendrede vespere (6a nov):

Bonvenigo kaj reciprokaj sinprezentoj.

Sesio unu: Enkonduka prezentaĵo kun diskuto: "La principoj de situacikomunika instruado": Ĝiaj esencaj trajtoj — cellingva, konversaciiga, komunikado bazita sur informo-manko. Komparo kun aliaj aliroj al lingvoinstruado: gramatikaj, strukturismaj, rektaj, Cseh, kognitivaj ktp. La rilato inter gramatiko kaj enhavo; la kontrasto inter statikaj temoj kaj dinamikaj situacioj; la relativa emfazo de parol-aŭskultaj kaj skrib-legaj kapabloj.

Poste interkona vespero, esence distra.

Sabata mateno (7 nov): Sesio du:

Ĝenerala prezento de *Tendaraj tagoj*. Ĝiaj celoj, strukturo, uz-maniero, helpiloj. Kiel suplementi ĝin ĝenerale. Demandoj aŭ komentoj de la partoprenantoj bonvenaj.

Sesio tri: Teknikoj de pridemandado: Prezento de demandaj teknikoj. Disdono de temoj pri ĉiutaga kaj Esperanta vivo. Para laboro — interdemandado. Poste en la pleno, elektitaj kursanoj starigos demandojn al la grupo. Fine, taksado de la teknikoj kaj rezultoj spertitaj. (*Ĉi tio tiom frue en la kurso, ĉar ĝi krome helpas la kursanojn pli bone interkonatiĝi.*)

Sesio kvar: Senti la kuntekston de verboj: Ĉi tio estas absolute ŝlosila demando, ĝusta uzo de la akuzativo kaj *-ig-* kaj *-iĝ-* dependas je ĝisinstinkte internigita sento pri la transitiveco aŭ netransitiveco de verboj. Kiel internigi tion jam de la komenco, prezentante verbojn ĉiam en sia minimuma kuntekSto: ekz. Mi staras, mi sidas kaj mi kuras, sed mi studas -ON, ŝatas -ON, manĝas -ON. (TT: ĉapitroj 3-7, 10, 20, 21).

Sabata posttagmezo: Sesio kvin:

Suplementaj ekzercoj: Kiel krei klasĉambrajn situaciojn paralele al tiuj en la libro, por profundigi la lernatan gramatikon. Ekzemplaj paĝoj: 14 (al kaj de); 19 (ordonoj); 25 (transformo de unuliga al duliga verbo); 31 (posedaj pronomoj) 39 (komparativo kaj superlativo).

Sesio ses: Ekspansii tabelojn: La principo de naturaj listoj. Kiel kreigi plenajn frazojn laŭ listaj informoj. Ekzemploj: TT ĉapitroj 4, 24, 32, 33, 34, 40, 43, 47, 48. Ĉiu kursano verku propran naturan liston pri temo neligita al la lernolibro.

Sesio sep: Forumo: Partoprenantoj rajtas prezenti siajn proprajn teknikojn, ideojn, spertojn, problemojn. Komuna ellaboro de solvoj por tiuj problemoj.

Sabata vespero: Sesio ok:

1) Prezento de la listoj verkitaj en sesio ses. Ĉiu tiros respondojn el la kursanoj kaj diskutigos ilin laŭ la propraj listoj.

2) Diskuto: Kiel prezenti la Esperantan vivon, komunumon, servojn kaj movadon al kursanoj diversaĝaj?

Dimanĉa mateno (8 nov): Sesio naŭ:

Varieblaj dialogoj: Kiel prezenti dialogon el la libro kaj poste adapti ĝin al duon-produktiva kreado kaj fine kiel sproni kursanojn krei proprajn similajn dialogojn. Ekzemploj: TT 35 (voj-instrukcioj en la urbo), 54 (*kial, ĉar*).

Sesio dek: Laŭpaĝa trairo: Ni trastudos ambaŭ kajerojn de la libro, analizante la evoluon de la situacioj kaj la subkuŝanta gramatiko. Diskuto pri la taŭgeco de la ordo, de la emfazo, de modifoj necesaj por difinitaj nacianoj, aĝgrupoj ktp.

Sesio dek unu: La principoj de rol-ludado: Post teoria enkonduko, ni plenumos unu rol-ludon sub la gvido de la kurs-gvidanto.

Sesio dek du: Verki rol-ludojn: Ĉiu kursano, unuope aŭ pare, verkos propran rol-ludon, difinante la rolulojn, situacion, celon kaj verkante la precizajn skribajn instrukciojn por la roluloj.

Dimanĉa posttagmezo: Sesio dek tri:

Firmigo de la sento de transitiveco-netransitiveco: TT ĉapitro 54. Koncentriĝo je la ofte uzataj sed neklare sentataj verboj (*manki, aperi, evolui, ŝanĝi* ktp.) Ekzercoj por firmigi la diferencon. Tio estas esenca preparado por la sekva temo.

Sesio dek kvar: La prezentado de -IG: La diversaj kategorioj de uzo, kiel ligi situaciojn taŭge al ili. Kiel suplementi la libron per klasĉambraj ekzercoj. TT ĉapitroj 57-60.

Dimanĉa vespero: Sesio dek kvin:

LA KULMINA KONCERTO: Prezento kaj realigo de la rol-ludoj verkitaj en sesio dek du. La verkintoj devas surscenigi la proprajn verkojn helpe de la ceteraj kursanoj, kiuj anticipe ne sciu la intencitan celon. Fine, pritakso de la sukceso, identigo de problem-punktoj aŭ neatenditaj rezultoj. Diskonigo de la intencitaj celoj se tiuj ne realiĝis.

Poste laŭdezire, prezento de pliaj koncertecaj eroj.

Lunda mateno (9 nov): Sesio dek ses:


La prezentado de -IĜ: La diversaj kategorioj de uzo, kursanoj mem proponu taŭgajn situaciojn. Poste ni diskonigos tiujn planatajn por la tria kajero de TT. Kiel ekzerci la formojn; kontrastigi -IG- kun -IĜ- kaj komprenigi (kompreneble) la tutecon de ilia uzado.

Sesio dek sep: Komuna tasko: Ni starigos komunan taskon, ekzemple, plani grupan vojaĝon ien aŭ fondi ĉio-vendejon, kaj mem plenumos ĝin, analizante kiel oni povos gvidi similan kun propra grupo.

Sesio dek ok: Konkludo: Lastaj demandoj. Pritakso de la kurso. Diskuto pri la E-instruado ĝenerale. Resumo de la instruado planata de la kursanoj, helpo antaŭvideble bezonata, starigo de daŭraj ligoj inter la partoprenintaj instruistoj.

ALMENAŬ UNU AKTIVA INSTRUISTO EL VIA LANDO PARTOPRENU!

Aliĝilo kaj praktikaj informoj aperis en IPR 92/2.



La foto klare montras la vervon per kiu s-ro Arnaudov el Bulgario superis la antaŭjuĝojn kontraŭ matematiko de la gimnazianoj en Bratislavo. Sur la sekvaj paĝoj ni prezentas fragmenton el lia kursmaterialo, kiun ILEI planas eldoni plene en nove lanĉota serio de gimnaziaj kajeroj.

Foto: M. Zvara

GIMNAZIO:

LECIONO PRI MATEMATIKO

PetkoARNAUDOV

Kelkaj metodikaj sugestoj

Matematiko estas multfaca afero kiun multaj plej ofte konsideras nur kiel komplika kaj timiga objekto. Kaj facile okazas, ke iuj komencas malŝati ĝin. Tial estas tre grave, ke oni montru ankaŭ la amuzon, la plezuron riceveblajn pere de ĝi. Kaj ĉiu amuzo akompaniĝas de estetika plezuro, nepreterlasebla. Aliflanke, la amuzo akompananta ion ajn igas ĝin agrabla. Tial, se oni ricevas amuzon pere de matematiko, tio nature, sen altrudo igas la matematikon agrabla - nepra kondiĉo, por ke la homo, precipe la juna homo, sin okupu pri matematiko. Pro tio oni ne devas preterlasi okazon prezenti al la junaj homoj, al la gelernantoj la amuzan flankon de matematiko. Aparte utila tio estas kiam la lernolaboro iĝas enua pro iu komplika pruvo aŭ malfacila teoremo, aŭ longaj kalkuloj. Tiam oni devas provoki paŭzon per iu amuza matematikaĵo. Des pli, ke samtempe detruiĝas la negativa mito pri "la terura matematiko". Plue, tiaj paŭzoj malŝarĝas la mensan streĉon dum intelekta laboro. Tia paŭzo tamen fakte ankaŭ laŭ si mem estas aktiva kvankam iom alispeca mensa laboro, kiu kontribuas por la ĝenerala perfektiĝo de la homo, ĉar laŭsence ĝi kontrolas kaj refreŝigas la scion de fundamentaj matematikaj konoj, ĉiutage necesaj por ĉiu homo, kaj ĝi nerimarkeble igas la homon pensi logike, kio estas grava trajto de la homa perfektiĝo.

Kompreneble la solvo de kiu ajn tasko akompaniĝas per kontenteco, plezuro kaj amuzo, tamen estas taskoj specife amuzaj. Tiajn taskojn oni ĉiam devas esti preta prezenti al siaj gelernantoj. Ordinare du–tri, kiam estas necese, en iu lernohoro.

Nun, tie ĉi en Bratislavo, pro la tute aparta "fizionomio" de la internacia gimnazio ĉiu horo pri matematiko estas saturita de amuzo sed ĉiu atenta observanto aŭ partoprenanto sendube konstatos, ke tiu amuzo estas tre, tre utila. Memkompreneble ĉio prezentota estas ekzempla, ne deviga. Pri ĉiu temo intence estas prezentitaj taskoj sufiĉaj por pli ol necese por unu lernohoro, ĉar kio ajn estas sufiĉa nur se oni en donita intervalo de tempo ne sukcesas ĝin plene konsumi. Krome, mi supozas, ke eble aperos okazo ke mi havu aldonajn eksterprogramajn, laŭvolo de la gelernantoj lernohorojn (lernookupojn).

[La aŭtoro prezentas tri grupojn da taskoj: 1. Taskoj pri translokigo aŭ forigo de alumetoj; 2. Facila kaj amuza kalkulado; 3. Matematikaj artifikaĵoj kaj ludoj. En tiu ĉi artikolo Vi povas legi la mezan ĉapitreton – taskojn kun solvoj –, la plena verko aperos en la serio de Gimnaziaj Kajeroj. *La red.*]

Facila kaj amuza kalkulado

1. Du turistoj sidis manĝi. La unua havis du frititajn fiŝojn, la dua nur unu tian fiŝon. En tiu momento aliris tria turisto kaj petis, ke li manĝu kun ili, kaj li pagos. Do, ĉiuj manĝis po egale kaj foririnte la tria turisto donis al ili 5 kronojn. Kiamaniere la unuaj du turistoj devas dividi inter si la 5 kronojn?

2. Gefratoj ricevis de la gepatroj 90 kronojn. La frato diras al la fratino: "Donu al mi 10 el viaj kronoj kaj mi iĝos duoble pli riĉa ol vi"! Kiom da kronoj ricevis ĉiu el ili?

3. Frato diris al sia fratino: "Donu al mi 8 el viaj nuksoj kaj mi havos duoble pli ol vi" La fratino respondis: "Pli bone, ke vi donu al mi 8 nuksojn el la viaj, por ke ni havu po egale!" Kiom da nuksoj havis ĉiu el ili?

4. Kiu estas la ducifera numero 7-oble pli granda ol la nombro kiun prezentas ĝiaj unuoj?

5. Jen estas la numero 123456789. Kiu multiplikos ĝin per 9?
(La rezulto estas 1111111101).

Venu nun du personoj kaj la unua multipliku la donitan numeron per 18, la dua per 27. Ni vidu kiu unua faros la multiplikon. Ĉu ĉiuj bone vidis la rezultojn?

Aŭ mem multipliku, aŭ observu bone kion ili ricevos multiplikante la donitan numeron per 36, la unua kaj per 45, la dua!

Ĉu vi nun scias, kion oni ricevos multiplikante la saman (donitan) numeron per 54 aŭ per 63? Kiu sukcesos unua kontroli? Skribu tuj la rezulton de la multipliko de la donita numero per 72 kaj per 81 kaj petu tiun, kiu dubas, mem kontroli farante la kalkulojn.

6. Kiu scias la manieron rapide kalkuli $a5^2$ a= 0, 1, 1, ... 9?

7. Ĉu vi scias rapide multipliki najbarajn numerojn? Ekzemple 13x14 =?

8. Se oni dividos duoncenton per duono, kiom estos la rezulto?

9. La aĝo de iu avo estas 56 jaroj kaj la aĝo de lia nepo 14 jaroj. Kiam la avo estos duoble pli aĝa ol la nepo?

10. La pasaĝera trajno trairas 64 kilometrojn dum 1 kaj 1/3 da horoj. Kiom estas ĝia rapideco po horo?

[....]

12. Ordinare la muraj horloĝoj notas ĉiun horon per tiom da batoj, kiom montras la numero de la horo. Kiom da batoj tio estas en diurno?

13. Ludo per kalkulado. Kvar personoj venu ĉe la nigra tabulo, mi petas:
La unua multipliku 12 per 9 kaj aldonu 3.
La dua multipliku 123 per 9 kaj aldonu 4.
La tria multipliku 1234 per 9 kaj aldonu 5.
La kvara multipliku 12345 per 9 kaj aldonu 6.
Ĉu vi nun povas diri la rezulton, ne kalkulante, se oni multiplikos 123456 per 9 kaj aldonos 7?

14. Ni havu la taskon adicii la numerojn: 111, 333, 555, 777 kaj 999. Kiu unua anstataŭos 12 el la ciferoj de tiuj numeroj per nuloj tiel ke la sumo de la kvin novaj numeroj estu 20?

Se neniu sukcesos rapide orientiĝi en la tasko, jen iom da helpo:

La donita sumo	La unua solvo	La dua solvo
1 1 1	0 1 1	0 1 0
3 3 3	0 0 0	0 0 3
5 5 5	0 0 0	0 0 0
7 7 7	0 0 0	0 0 7
9 9 9	0 0 9	0 0 0
2 7 7 5	2 0	2 0

Kaj nun jen la tasko, kiun vi mem devas solvi:

a) Anstataŭigu per nuloj 9 el la ciferoj de la 5 adiciatoj tiel, ke la sumo estu 1111

b) Anstataŭigu per nuloj 8 el la ciferoj de la 5 adiciatoj tiel, ke la sumo estu 1111

c) Anstataŭigu per nuloj 6 el la ciferoj de la 5 adiciatoj tiel, ke la sumo estu 1111

d) Anstataŭigu per nuloj 5 el la ciferoj de la 5 adiciatoj tiel, ke la rezulto, la sumo denove estu 1111.

[..]

16. Du virinoj kuiris kune kaĉon. La unua donis 2 tetasojn da faruno kaj la dua 3 tetasojn da faruno. Kiam la kaĉo estis preta, venis aliaj du virinoj kaj la 4 formanĝis la tutan kaĉon. Ĉiu el la venintaj virinoj donis po 5 kronojn, antaŭ ol foriri. Konsiderante, ke la 4 virinoj konsumis po egale, kiel maniere la unuaj du devas dividi inter si la 10 kronojn?

17. Du personoj sidis sub arbo tagmanĝi. Aliris tria persono kaj proponis aldoni sian provizon kaj ke ili manĝu triope. La tutan manĝaĵon oni dividis po egale. La unua havis botelon da lakto, la dua unu panon kaj la tria ses figojn. Post la tagmanĝo la tria diris: "Ĉiu el vi donis pli ol mi, do, jen al vi 20 kronojn kaj ĉiu el vi prenu laŭ lia kontribuo al la komuna manĝo." Kiamaniere la unuaj du personoj devas dividi inter si la 20 kronojn se 4 boteloj da lakto kostas egale je 3 panoj kaj unu botelo da lakto kostas egale je 36 figoj?

18. Kiu unua kalkulos la sumon de la numeroj de 1 ĝis 100 inkluzive?

19. Kiu unua kalkulos la sumon de la numeroj 2, 5, 8, 11, 14, 17, 20?

20. Ludo per kalkulilo. Venu 4 personoj ĉe la nigra tabulo.

- La unua multipliku 9 per 9 kaj aldonu 7
- La dua multipliku 98 per 9 kaj aldonu 6
- La tria mlultipliku 987 per 9 kaj aldonu 5
- La kvara multipliku 9876 per 9 kaj aldonu 4

Kiu unua diros la rezulton se oni multiplilkos 98765 per 9 kaj aldonos 3?

Respondoj, klarigoj, solvoj de la taskoj

1. La 5 kronojn devas preni la unua turisto, ĉar la dua turisto havas nenian kontribuon por la manĝo de la tria.

2. La frato ricevis 50 kaj la fratino 40 kronojn. Laŭ la teksto de la tasko oni facile ricevas kaj solvas la sistemon de du variabloj:

$$x + y = 90$$
$$2(x - 10) = y + 10$$

3. La frato havis 56 kaj la fratino 40 nuksojn. Ĉi foje la sistemo kiun oni devas solvi estas:

$$2 (x - 8) = y + 8$$
$$x + 8 = y - 8$$

4. 35. La solvo mem: Per 10a + b prezentiĝas kiu ajn ducifera numero. La cifero de la dekoj estas a, la cifero de la unuoj estas b, Sekve laŭ la teksto 10a + b = 7b, aŭ 10a=6b, aŭ 5a=3b, sed *a* kaj *b* estas ciferoj kaj nur la duopo a=3 kaj b=5 kontentigas la egalaĵon, do, la serĉata numero estas 35.

5. 18, te. 9.2 kaj la produkto 1111111101.18= 2222222202;
27, te. 9.3 kaj la produkto 1111111101.27= 3333333303;
36, te. 9.4 kaj la produkto 1111111101.36= 4444444404, sekve dividante je 9 la multiplikanton de 123456789 oni ricevas la ciferon, per kiu estas skribita la produkto t.e. la unuoj en la unua produto oni sinsekve anstataŭigas respektive per 2-oj, 3-oj ktp.

6. Jen la regulo: oni devas uzi la algoritmon - fine ĉiam estas 25 kaj la antaŭaj ciferoj estas la ciferoj de la numero a(a+1)

7. Najbaraj numeroj estas **a** kaj **a+1** sed $\mathbf{a(a+1)=A^2+A}$. Tre helpas se oni parkere scias $\mathbf{a^2}$ por **a** de 1 ĝis 20 almenaŭ. Do, 13.14=169+13=182.

8. La rezulto estos 100. Ja, duoncento t.e. 50 kaj dividi per duono t.e. per 1/2 signifas multipliki per 2.

9. Kiam la avo estos 84 jaraĝa, la nepo estos 42 jaraĝa, do post 28 jaroj.

10. 48. La solvo: la trajno veturis 4/3 horojn, do por 1/3 ĝi trairis 4 foje malpli, sekve 64:4=16. Sed en unu horo estas tri trionoj, do por unu horo la trajno trairos 3 foje pli t.e. 16.3=48 km estas la rapideco de la trajno po hore.

[..]

12. 156. Tie ĉi oni du foje devas kalkuli la sumon de la numeroj de 1 ĝis 12 sed 1+ 12= 13, do oni simple multiplikas 12 per 13 12.13= 156.

13. Ĉiuj produktoj estas numeroj skribitaj nur per la cifero 1. La numeron, kiun oni aldonas montras la nombron de la uzitaj ciferoj 1 en la produkto, tial 123456.9+7=1111111

14. Jen la solvoj:

1 0 0	1 1 1	1 0 0	1 1 1
0 0 0	0 0 3	3 3 0	3 3 3
0 0 5	0 0 0	5 0 5	5 0 0
0 0 7	0 0 7	0 7 7	0 7 7
9 9 0	9 9 0	0 9 9	0 9 0
---	---	---	---
1 1 1 1	1 1 1 1	1 1 1 9	1 1 1 1

[..]

16. La unua devas preni 3 kaj la dua 7 kronojn. Jen la solvo: Evidente la manĝo de ĉiu virino estas pritaksita je 5 kronoj, sekve la tuta manĝo kostas 20 kronojn. Sed la manĝo riceviĝis de 5 tetasoj da faruno, do la manĝo ricevita de la tetaso da faruno kostas 4 kronojn kaj ĉiu virino formanĝis kaĉon ricevita de faruno egala je 5/4 de tetaso da faruno, kio signifas, ke la manĝo ricevita de 1/4 de tataso da faruno kostas 1 krono. La manĝo farita de la faruno de la unua virino estas 8/4 kaj ŝi mem formanĝis 5/4, do ŝi devas fakte ricevi monon nur por 3/4 de porcio da manĝo, do nur 3 kronojn. La ceterajn 7 kronojn devas ricevi la dua virino.

17. La unua prenis 5 kaj la dua 15 kronojn. Jen la solvo: Evidente 4 boteloj da lakto, t.e. 144 figoj estas la prezo de 3 panoj. Sekve la pano kostas 48 figojn. Tio signifas, ke la 3 tagmanĝoj kostis kiel 90 figoj kaj ĉiu tagmanĝo — 30 figoj. Kaj ĉar la kontribuo de la unua persono egalas je 36 figoj kaj la kontribuo de la dua je 48 figoj sekvas, ke la unua persono devas ricevi kronojn por 6 figoj kaj la dua por 18 figoj. La dua devas ricevi 3-oble pli ol la unua, do 20 kronojn oni dividas per 4, unu kvarono, t.e. 5 kronojn prenas la unua kaj 3 kvaronoj (trifoje pli) - 15 kronojn prenas la dua.

18. 5050;

19. 77;

20. Ĉiu rezulto skribiĝas nur per la cifero 8, (a+1) foje, kie "a" estas la numero de la ciferoj el kiuj konsistas la unua multiplikanto.

Petko ARNAUDOV
N. Popkonstantinov 40.
4400 Pazarĝik, Bulgario

LANDAJ SEKCIOJ DE ILEI

RAPORTOJ EL LA ENKETILOJ KOMPLETIGITAJ KUN LA INFORMOJ DONITAJ DUM LA ILEI KONFERENCO EN BRATISLAVO

Argentino: en la lernejoj kaj la universitatoj ne okazas kursoj, okazis 18 kursoj, ĉefe por komencantoj, nur du porinfanaj. 86 homoj lernis kaj finis la kurson; nun funkcias sep kun 50 homoj, nur unu por infanoj; lernolibroj eldonitaj en Argentino. Kunlaboro inter Argentino kaj Brazilo komenciĝis en la jaro 1990, konferenco pri instruado, ĉi jare-konferenco dum oktobro; en San Paolo kurso por blinduloj Germana Instituto por la interŝanĝo de studentoj ebligis E-kurson por 30 studentoj el Santa Anna kaj 20 studentoj el Gvatemalo.

Aŭstrio: la membraro kreskis de 13 al 14; la cirkulero aperas 1 ĝis 3 foje jare; stando ĉe „Expolingua" komune kun IEM en Vieno; Cseh-kursoj - gvidas instruistoj el Hungario; muzeo ofertas korespondkursojn; eldonas gazetarajn komunikojn germanlingve, tre bona kvalito; (sekciestro multe laboras, sed li estas izolita solulo)

Belgio: mankas informoj; nova sekciestro A. Humet ne reagis; Pirlot mencias 6 kursanojn en la brusela universitato; kurso en la lernejo por tradukistoj; FEL ofertas multajn kursojn, sed ili ne estas en lernejoj; proponita universitata intersanĝo Belgio - Slovakio.

Bolivio: forta apogo por kursoj; se estus diplomito eblus instrui ĉe la universitato.

Brazilo: 4 tipoj da kursoj; entute 97, ne ĉiuj lernejaj; universitataj kursoj liveras poentojn por la studprogramo: (Brazilia, k.a); Juiz de Foa rektoro mem E-isto; en Brazilia estro de la lingva fako apogas Esperanton; lernejo en Alta Paraizo "Bona espero" estas oficialigita kaj oni metis en la instruprogramo E-on kiel propedeŭtika lingvo kaj oni rajtas oficiale instrui E-on en la unuaj kvar elementaj klasoj; dum la landa kongreso oni organizas kursojn por neesperantistoj kaj por E-istoj; porpono: regionaj delegitoj-sekciestroj pro tro vasta lando.

Britio: 6 ĝis 7 kursoj en York, nekonata nombro de la kursanoj; regas malfavora klimato kontraŭ Esperanto; aperas E-Teacher, sed oni ĝin neniam sendas al ILEI; en Britio ĉirkaŭ 100 membroj sed en ILEI nur 12.

Bulgario: ne sendis la enketilon; E-o estas instruebla en la gimnazio: 8 - 10 klasoj; kursoj daŭras en la universitatoj de Sofia kaj Veliko Tarnovo; kursoj en la Sofia klubejo; dum la antaŭaj jaroj oni sendis informojn pri la enorma nombro da studentoj.

Ĉehio: instruista gazetaro informis pri E-instruado kaj invitis instruistojn helpi; oni gvidas kursojn kiel libertempa programo; entute ĉirkaŭ 7 lernejoj kun 100 gekursanoj; por la junularo oni organizas someran E-tendaron, kaj kurson kunlabore kun Germana E-Junularo laŭ "Gerda malaperis..." (internaciaj kursoj) same oni organizas korespondajn kursojn, sed la reago estas tre malgranda, (antaŭ kelkaj jaroj estis eĉ pli ol 400, kaj dum la lasta malpli ol 10).

Ĉilio: Santiago: 3 kursoj.

Ĉinio: venis respondo; grandaj atingoj, sed jam antaŭ ni staras la problemo kiel utiligi E-on en la praktiko; Iam ĈEL menciis 500.000 lernantojn; kursoj ĉe la universitatoj; bone planita trejnado de E-instruistoj; ili retiris sin, kaj deziras fari kvaliton anstataŭ kvanto; cento da kursoj, deko da miloj da kursanoj; ekzamenlibreto eldonita ĉine.

Ekvatorio: neniu informo.

Estonio: deko da lernejoj, kun pli ol 100 lernantoj.

Finnlando: laŭ la enketilo funkciis 29 kursoj; internacia somera universitato Jyväskyla - grava somera kurso 60 finnoj; kunlaboro kun blinduloj; leterkurso; unu kurso por 6 infanoj okazas post la oficiala studhoroj

Francio: malsukcesis leĝpropono por enkonduki E-on en la lernejoj; kursoj en 6-7 lernejoj; okazis pli ol 20 kursoj inkluzive la universitatajn en Aix-en-Provence kaj Clermont-Ferrand. Altlernejoj en la 10 departamentoj plu aktivas, eble estis proksimume 300 gelernantoj.

Germanio: 4 foje jare aperas cirkulero "E-o kaj instruado"; E-grupoj en la gimnazioj; en Germanio multaj lernejoj volas fariĝi UNESKO- lernejoj, mem volas enkonduki E-on; fakkongreso de la fremdlingvaj instruistoj invitis esperantistojn, oni organizis standon; E-istruado en la lernejoj okazas kiel libervolaj kursoj; ofte instruistoj estas pagataj; semajnfinaj-kursoj por la gejunuloj (GEJ) - minimume unu foje monate; kursoj por familioj kaj infanoj -apartaj aranĝoj; eldonado - vortaroj; oni invitas E-istojn kaj oni pagas por gvidi kursojn, komputila reto - kurso, multaj studentoj - angla lingva kurso pri Esperanto, eĉ multaj germanoj lernis E-on pere de angla — nova fenomeno; kunlaboro kun radio-stacioj.

Gvatemalo: v. ĉe Argentino.

Hungario: sendis enketilon; ĉirkaŭ 60 membroj, sed estas pliaj instruistoj en Hungario; regula kunveno " Pedagogiaj tagoj " ; korespondaj kursoj por la plenkreskuloj; de infanĝardeno ĝis la universitato Esperanto estas elektebla; nuntempe la pleja sukceso en la mezlernejoj kaj gimnazioj, ĉar por eniri universitaton oni faras ŝtatajn lingvoekzamenojn, ĉiu lingvo-ekzameno valoras 1-3 poentojn (en tiu grupo apartenas same E-o); en la lasta lernojaro lernis ĉirkaŭ 1688 lernantoj, en infanĝardenoj, lernejoj, mezlernejoj kaj universitatoj.

Italio: en Italio funkcias Itala Esperanto-Instituto kiu prizorgas kursojn kaj sekcio de ILEI kiu havas 100 membrojn; ĉiam malhelpas konsilo de la Ministerio mem laŭ kiu oni preferas kiel fremdan lingvon la anglan kaj kiam eĉ instruistoj volas instrui tiumaniere afero malfortiĝas; kluboj organizas kursojn, rezultojn oni prezentas fine de la jaro.

Kolombio: neniaj informoj.

Koreio: laŭ la enketilo entute 37 kursoj; universitataj kaj klubejaj kursoj plejparte; oni organizas komunan E-seminarion inter la koreanoj kaj japanoj; unu doktoro prilaboris komparan studon de la korea lingvo kaj Esperanto.

Kroatio: pasint-jare oni organizis 3 bazlernejajn, kaj unu mezlernejan kursojn kaj dekon en la klubejoj por la komencantoj kaj progresintoj; bedaŭrinde pro la milito ekde septembro kursoj ĉefe okazas en Zagrebo (bazlernejaj kaj klubejaj - por junularo kaj plenkreskuloj); krome oni organizas konversaciajn kursojn; pri la agado oni informis kelkfoje pere de la radio (nacia kaj E-programo) kaj la televido, kaj E-gazetoj.

Nederlando: 8 kursoj; bazlernejaj, universitataj, porjunularaj, gimnaziaj; infanrenkontiĝoj, eldonado de infankaŋtlibroj kaj infanpublikaĵoj.

Nordamerika: organizitaj 49 kursoj kun preskaŭ 200 gekursanoj; kursoj okazas por la baz- kaj mezlernejanoj, ĉe la universitatoj; tre gravas kvalito - trejnado de la instruistoj; organizataj metodikaj seminarioj - kiel instrui E-on;

Norvegio: reorganizo de la sekcio; 8 kursoj; en unu popola altlernejo oni instruas 4 horojn semajne; 19 membroj.

Peruo kaj Paragvajo: nenio okazas.

Pollando: reorganizo de la sekcio; 100 kursoj (en Bydgoszcz la plej multe) por ĉiuj aĝoj; kunlaboro kun la Metodika centro de la supera instruado, kiu rajtas doni la diplomojn kun ili organizitaj porinstruistaj kursoj;

Rumanio: universitaj kursoj, kursoj ĉe popolaj universitatoj kaj kluboj, radia kurso en la kadro de porjunulara programo en Bukuresto, kaj AIS.

San Marino: ne okazis kursoj dum la lasta jar.o;

Slovakio: centro en Poprad organizas intencajn - dusemajnajn kursojn; kursoj organizitaj por slovakoj, sed same alinacianoj vivantaj en Slovakio - internacia lernejo; dum la lasta jaro por kurso aliĝis proksimume 20 gekursanoj, antaŭaj jaroj po 50; E-centro same organizas plurlingvajn korespondajn kursojn; krome kursoj okazas en la klubejoj kaj lernejoj (gimnazioj); reeldonita lernolibro por progresintoj, reeldonota " Fundamento de Esperanto", de s-ro Tvarozek; entute oni organizas ĉirkaŭ 43 kursojn po 15 gekursanoj.

Slovenio: ne multaj lernejoj - nur kvar kiel libervola aktiveco; ĉe la teletekso de la ŝtata televido regula ĉiusemajna E-kurso kaj informado pri E-o, post la kurso reagis skribe nur kelkaj personoj, por ili oni planas aŭtune organizi klubejan kurson; grave malhelpas E-instruadon prefero de la angla lingvo, jam de la 3-a klaso;

Svedio: sep kursoj; popollernejo en Karlskoga organizas regulajn kursojn semajfinajn kaj oksemajnajn; tie oni atingas bonajn rezultojn; okazas aliaj kursoj, sed ne donitaj informoj.

Urugvajo: nenio okazas.

Venezuelo: unu kurso ĉe la Centra Universitato, diplomojn disdonadis Universitata Kulturdirekcio kaj la Kultura Fondiĝo "Esperanto"; tri kursoj.

Ni dankas al ĉiuj sekciestroj kaj konferencanoj kiuj helpis kompili informojn pri la Landaj Sekcioj de ILEI.

M. Belošević

Plia aliĝpeto al ILEI:

Sidejo, kursoj, filmoj tra ĉiuj obstakloj

Jam dum nia konferenco en 1990, la estraro diskutis kun la kubaj instruistoj pri la fondo de sekcio, ĉar sur la insulo multa instruado okazas. Surbaze de du leteroj, la lasta alveninta pere de la UK, ni estas pretaj proponi al la Komitato de ILEI akcepton de kuba sekcio. Ni citas el la leteroj:

"Nia movado daŭre plifortiĝas kaj en nia laborstrategio por la nuna kaj venontaj jaroj, inter aliaj prioritatoj, ni prioritatigis la instruadon de la lingvo kie ajn estas ebleco tion fari kaj uzante kiajn ajn rimedojn por garantii ĝian disvastigon. Tra la tuta lando ni disponas je pli ol 38 lernejoj, el kiuj ok en la ĉefurbo. Ni klopodas etendigi nian movadon al novaj regionoj kie neniam antaŭe ni instruis la lingvon. Ni instruas laŭ la libro de Joge Hess "Sabe ud. Esperanto?" (Ĉu vi konas Esperanton?) kaj la broŝuro "Karlo" de Edmond Privat. Pliaj materialoj ege mankas al ni. De antaŭ unu jaro kaj duono [...] kreskis malfacilaĵoj en nia lando. Tiuj problemoj ankaŭ etendiĝis al nia movado — eĉ por akiri paperon por la presado de lernolibroj aŭ ekzercaroj ni havas malfacilaĵojn. Ekzemple, en lernejoj, ni jam ne povas instrui vespere, ĉar en la tuta lando oni sekvas politikon cele ŝpari elektroenergion (ĉefe pro manko de petrolo) sed ni rapide ŝanĝis nian strategion kaj neniam haltis la instruado de Esperanto. Niaj instruistoj tra la tuta lando instruas (volontule, kiel ĉiam antaŭe) sabate kaj dimanĉe matene cele profiti la naturan lumon.

Ĉar ne ĉiuj dezirantoj povas ĉeesti tiam, ni ofertis perkorespondajn kursojn kaj informis pri tiuj kursoj per radio, la gazetaro, rektaj kontaktoj kaj kulturaj institucioj (muzeoj, kulturdomoj ktp.). Plie ni starigis 'kursojn per renkontiĝoj' laŭ kiuj ni renkontas la lernantojn ĉiun duan sabaton kaj ekzercigas kaj paroligas ilin sed ili devas prepari sin individue por ĉiu nova renkontiĝo. Por la aŭskultado de la lingvo ni ebligas la surbendigon de tekstoj per kasedoj. Ni laboras por disvastigi sciojn pri la lingvo: ni kunlaboras kun la Asocio de Kubaj Lingvistikistoj, la fako de Literaturo kaj Lingvistiko de la Havana Universitato."

"Antaŭ unu jaro ni ricevis de la registaro novan dignan duetaĝan sidejon, kie ni iom post iom kreas la kondiĉojn por organizi niajn kulturajn kaj aliajn aranĝojn. Nun ni organizas tiajn ĉiun duan sabaton kaj krome kunsidojn kaj

montradon de filmoj por niaj asocianoj. Pasintmonate ni organizis nacian seminarion por instruistoj, kies rezulton ni konsideras sufiĉe bona.

Ni sendas liston da aliĝintoj kun 29 nomoj. Bonvolu, kontakti nin por esplori la eblecon oficialigi nian membrecon en ILEI ekde januaro 1993. Niaflanke estas neniu problemo tion fari."

La supraj agadoj priskribas la laboron de KEA entute; la instruista sekcio estas integra parto de ĝi, sub la gvido de s-ro Héctor Jiménez, la sekretario pri edukado en la nacia estraro de KEA. Li estas la proponata sekciestro.

Ni sekve petas la komitatanojn de ILEI pere de siaj sekcioj voĉdoni ĝis la 31a de novembro 1992 pri la akcepto de kuba sekcio de ILEI, por ke la voĉdoniloj atingu nian sekretarion ĝis la jarfino. Ni dissendos la balotilojn rekte al la sekcioj. Memoru, la rezulto validos nur se minimume duono de ĉiuj komitatanoj respondos!

El sekciaj bultenoj... El la junia 'AAIE-bulteno' ni ricevas detalan liston de la E-kursoj okazigitaj tie en 1991/92: deko da okazis en Ĉikago, inkluzive de telefonaj kursoj, pliaj en Berkeley, Sacramento, Santa Barbara, Sunnyvale (ĉiuj Kalifornio), en Westhampton (Massachusetts) kaj Reno (Nevado). • De s-ino M. Almassy ni ricevis sciigojn pri pluraj kursoj okazigataj en kaj apud Subotica. • El Estonio venis raporto pri Cseh-seminaro kun 30 partoprenantoj en Viljandi sub gvido de Eva Bondar (Pollando) kaj Rein Saag (Estonio). • La nederlanda sekcio aperigis okulfrapan flav-ruĝan faldfolion "Kio estas, kion faras, NGGE, ILEI?" kun klara listigo de la celoj kaj servoj de ambaŭ organizoj. • La septembra numero de la dulingva nove titolita germana bulteno: "Esperanto kaj instruado" montras laŭdindan renovigon de la prestekniko kaj enpaĝigo. Bedaŭrinde ĝi portas ankaŭ la sekvan malĝojigan informon.

Mortis en aprilo 1992 la 55-jara instruisto, s-ro Heinz-Gerd Diesenhoff el Duisburg. Li eklernis Esperanton en 1983 kaj partoprenis la instruistan kurson de ILEI en Svislando en 1989. Li regule instruis Esperanton en sia lernejo, korespondante kun klasoj en Hungario, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio. Li realigis ĝemeladon kun lerneja klaso en Heemskerk, Nederlando. ILEI kondolencas al liaj familianoj kaj studentoj.

INVITO

Sonja TAVČARja sekciestro de nia slovenia sekcio, pretas gastigi junan ĉeĥan aŭ slovakan instruist(in)on dum la kristnaska libertempo dum unu semajno. Ŝia loĝloko estas pitoreska vilaĝo apud la Adria Maro. La gasto havu minimume B-gradan diplomon, profitu semajnon da konversaciado kaj diskutado pri pedagogiaj temoj, kaj estu preta komenci instrui Esperanton en sia klaso post la reveno. Dezirantoj skribu sinprezente al:

s-ino S. Tavčar, Liminjanska 6, SLO-66320 Portoroz; tel. (066) 70-177.

Jen imitinda ekzemplo; instruista trejnado ne devas okazi ekskluzive en kursoj organizitaj de ILEI centre kaj internacie, sed povus laŭ tiaj privataj iniciatoj aŭ pere de kunlaboro inter du aŭ kelkaj sekcioj! Ni supozas, ke la restado en Slovakio dum la konferenco spronis s-inon Tavčar fari tiun oferton ĝuste al Ĉeĥoj aŭ Slovakoj.

Juna amiko iĝos dudek-jara en 1993! Pli aĝa ol ĝia legantaro! Ekde 1993 ĉiu numero havos 32 paĝojn tio estas 8 pli ol nun!

Ni kuraĝas ampleksigi *Junan amikon* ekde 1993, ĉar ni volas prezenti pli da materialo por la diversaj aĝ-grupoj. Precipe rakontoj kaj ludoj por pli junaj legantoj bezonas pli grandajn literojn kaj pli da desegnaĵoj. Do, ne plu 24-paĝoj sed 32! Sekve, la abonkotizoj altiĝos proporcie — por neniu lando estas reala prez-altiĝo. Krome ni fortigas la rabatojn por kvantoj por kuraĝigi instruistojn vere mendi ekzempleron por ĉiu lernanto en la grupo. Se vi mendas pli ol 25 ekzemplerojn, la revuo kostos al vi malpli ol ĉi-jare! Notu, ke oni ricevas fortan rabaton, se oni eĉ nur du ekzemplerojn mendos. Faru tion! Konservu unu por vi mem kaj donacu unu al lernanto aŭ amiko!

TARIFOJ:	A	B	C	Ĉ	D
1 abono	16 GLD	10 GLD	300 HUF	250 HUF	160 HUF
2–5 abonoj	12 GLD	8 GLD	260 HUF	210 HUF	130 HUF
6–24 abonoj	10 GLD	7 GLD	200 HUF	170 HUF	100 HUF
25 aŭ pli	8 GLD	5 GLD	150 HUF	130 HUF	80 HUF

Tarifo A: Validas por okcidenta Eŭropo, Nord-Ameriko, Japanio kaj Oceanio. En multaj landoj ekzistas peranto kun kotizo en nacia valuto. Ekz.:

Svedio: L. Andreasson. 50, 40, 30, 25 SEK.
Francio: UFE. 45, 40, 30, 25 FRF
Italio: C. de Lorenzi. 10.000, 8.000, 7.000, 5.500 LIT.
Usono: ELNA kaj Bern Wheel Books. 9, 8, 7, 5 USD. (aerpoŝte)

Tarifo B: Latinameriko, Isrealo, Koreio. (inkl. aerpoŝta sendado)
Tarifo C: Rusio, Baltio, Bulgario, Pollando, Afriko, ceteraj nemenciitaj
Tarifo Ĉ: Landoj najbaraj al Hungario: R, YU, CR, SL, CS, UKR.
Tarifo D: Por loĝantoj de Hungario. Hungaroj dezirantaj donaci abonon al eksterlando pagos laŭ tarifo C.

Oni povas pagi rekte al la abonservo de UEA laŭ tarifo A; laŭ tarifoj A aŭ B al la kasisto de ILEI, laŭ la forintaj tarifoj al la hungara ILEI-sekcio (adresoj dorskovrile). La plena listo de tarifoj kaj perantoj aperis en numero 92/3 de *Juna amiko.* Petu ekzempleron el Budapeŝto se vi ankoraŭ ne abonas ĝin!

Memoru — *Juna amiko* nun apartenas al ILEI — diskonigante ĝin vi samtempe helpas lernantojn kaj la Ligon!

LIBRO-RECENZOJ

Step by Step in Esperanto; Montague C. Butler. ELNA, El Cerrito, 1991: 9a eldono. Unua eldono 1948. 280 paĝoj.

Ĉi tio estas senŝanĝa represo de pli fruaj eldonoj, en bona kvalito kun fortika bindado. Ĝi estas lernolibro por anglalingvanoj, ĉu por hejma sola studado, ĉu por uzo en grupo. Ĝi uzas tradician gramatikan aliron, tamen proponante ĉion en serio da etaj sinsekvaj paŝoj, zorge ordigitaj, ne en la pli kutimaj ĉapitroj. Ĝi tendencos altiri tiajn homojn al Esperanto, kiaj jam nun parolas ĝin. Al aliaj la denseco de la materialo (1200 numeritaj paŝoj) kaj la neceso mem havi bonan komprenon de gramatiko povus timigi.

La aŭtoro ne nur citas la gramatikajn regulojn, sed konsilas laŭ reala lingvo-uzo — sed tiu el sia tempo, kio nun kelkloke impresas amuze: "la vorto 'tajpi', lastatempe proponita...". Li forte defendas la landnoman solvon 'ujo' proklamanta ĝin la sola praktike uzata. Li prezentas la formon 'Bonvole redonu' egale akceptebla kiel 'Bonvolu redoni', kio veris siatempe pli-malpli nur en angla-parolantaj regionoj, kaj tie nuntempe malpli.

La aŭtoro regalas nin per unika brita humur-stilo, same datita, tiom ke pluraj el la troveblaj ŝercoj estas tiom malnovmodaj, ke ili preskaŭ iĝis denove amuzaj. Li ofte prezentas Esperantajn proverbojn, sed ne kun la simpla angla versio piednote, sed rimanta pedante-bombaste amuza reprilaboro. Ekzemple, por "Tro da kuiristoj difektas la supon" anstataŭ "Too many cooks spoil the broth" ni rajtas frandi jene:

"A futile superfluity of culinary aid
Will mar the gastronomic juice of osseous tissues made."

kiun oni povus traduki:

"Senutila superfluo da helpantoj kulinaraj
Perturbos negative la klopodojn buljon-faraj."

La anglalingva prefaco al la dua eldono de la libro, verkita de la aŭtoro en 1948 estas humura majstro-verko, kiu katalogas la gamon da reagoj kaj reciproke ekskludaj sugestoj ricevitaj post la unua apero de la libro. Indus traduki ĝin Esperanten kaj laŭtlegi ĝin en nia venonta konferenco kiel averto al potencialaj lernolibro-verkistoj. Fine de la libro la humur-sento surfaciĝas denove en tamen ĉefe serioza 'Konsilo al la studinto' priskribante kiel plie spertiĝi kaj uzi la nove lernitan lingvon.

Mendebla de ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono; tel. (510) 653-0998. US$ 12,95 plus sendokostoj $1.50.

smg

Ne forgesu la etan libroservon de ILEI mem!

Mi vizitis grandan urbon — aŭtoro: Gbeglo KOFFI; Zamenhof Editores; jaro neindikita (1990?); 41 paĝoj; prezo: 10,50 gld ĉe UEA; 1a eldono; 15x21 cm; presmaniero: fotokopiado; ISBN mankas.

Temas pri unu el la maloftaj originalaj verkoj de afrikanoj en Esperanto. La enhavo: togolanda vilaĝano vizitas la ĉefurbon Lome kaj pasigas kelkajn tagojn ĉe sia filo. La leganto multon lernas pri la sociaj cirkonstancoj en tiu lando. La freŝa, simpla, alloga stilo bone peras la afrikan pensmanieron. Kelkaj esprimoj estas por mi nekutimaj, sed bone kompreneblaj kaj originalaj: *flarilo* (=nazo), *ŝprucigi okulakvon* (=plori), *revilaĝeniĝi, ĵusaĉetindaĵo, bonvenigantaro*.

Pro la enhavo kaj la bela kovrilo la libro estas bona donaceto. Espereble ĝi ne estas la lasta libro de sinjoro Koffi.

Maria kaj la Grupo — EMBA (pseŭdonimo de Emeriko BARANYAI, 1902–1961); originale verkita en Esperanto, antaŭparolo de Julio BAGHY, postparolo de Vilmos BENCZIK; eldonejo Pro Esperanto (poŝtfako 28, A–1015 Wien); 180 paĝoj; brila molkovrilo kun desegno de Tamás BAKOS; dua eldono 1990; prezo 25,50 gld; 15x21 cm.

Multaj juveloj de la originala Esperanto-literatruo putras unuopekzemplere en bibliotekoj kaj tial preskaŭ forgesitas. Reeldono de tia verko estas tial alte taksinda entrepreno. Maria kaj la Grupo estas verŝajne la sola romano, kies etoso estas nur la Esperanto-movado. La agantaj personoj estis gravuloj de la budapeŝta Esperanto-vivo en la intermondmilita epoko, sed ankaŭ tipaj por ĉiu Esperanto-klubo. Simbola estas la duĉambreco de la Esperanto-klubejo: en la ĉambrego amuziĝas bonantagistoj, en la malgranda ĉambro studas la „seriozaj" esperantistoj. Maria, la „bona spirito" de la klubo, tute sinofera, donas sian tutan forton kaj monon por sia grupo. Ŝi kaj aliaj ĉefroluloj ŝajnas al mi tro simple desegnitaj. Kompare al etnolingvaj verkoj, tiu romano estas nur meznivela. Sed por Esperanta literaturo temas pri grava verko kaj ties reeldono estas aplaŭdinda.

Fajron sentas mi interne — originala romano de Ulrich MATTHIAS; Eldonejo Pro Esperanto (Postfach 28, A–1014 Wien); 97 paĝoj; mola kovrilo kun desegno de Tamás BAKOS, prezo 15,90 gld (en Aŭstrio 96 ŝilingoj) ; 1a eldono 1990; 15x21 cm.

La romaneto rakontas pri la problemoj de junulo serĉanta vivcelon kaj homan varmon. Ĝi spegulas ankaŭ la politikan situacion en Mez-Eŭropo. La stilo estas flua kaj moderna; lingvaj neklaraĵoj tre maloftas. Eble oni povintus eviti troan amasiĝon de vortoj kiuj komenciĝas per ĉ aŭ finiĝas per j. Mi tre rekomendas tiun libron!

W. Klag.

La ŝalmisto de Hamelin AIMS, Cincinnati, 1992. 20p. Kolorilus.

Ĵus aperis plaĉa nova infanlibro en Esperanto. Plejparte ĝi rakontas per bildoj kun tre mallonga kaj amuze ripeta teksto, la konatan fabelon pri la rato-plago en la germana urbo Hamelino. La libron ornamas nigre-verde presitaj allogaj bildoj sur ĉiu paĝo. La literoj estas taŭge grandaj kaj la preskvalito bona. Al eta infano, oni povas laŭtlegi la rakonton montrante la bildojn, pli aĝaj volonte mem legos ĝin.


La libro estas eldonita de AIMS International Books, Inc., en multlingva serio. La sama titolo jam aperis en naŭ aliaj lingvoj (inkl. la japana, ĉina kaj rusa). Aliaj titoloj en la serio estas: La Tri Ursoj, Ruĝĉapulino kaj la Formiko kaj la Cikado. Se la nuna libro bone vendiĝos, la eldonejo povus eldoni Esperantajn versiojn de aliaj titoloj.



"Kial oni ne pelas la ratojn el la urbo?"
diras la ŝalmisto.

Adaptis la originan tekston Hanna Hutchinson, ilustris Edward Nofziger kaj tradukis al Esperanto David Crowell. La libro estas aĉetebla de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA), P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono, (ĉ. 4 dolaroj) kaj certe ankaŭ ĉe UEA.

smg



Kontaktilo por lernejaj klasoj 1992/1993

Tra pluraj jaroj ILEI enketas pri lerneja instruado, ĉiam kun malpli da reagoj. Do, ni reformulis la demandilon, por ke ĝia ĉefa celo estu permesi al klaso anonci sin kaj starigi kontaktojn kun aliaj klasoj. Sed ĉijare la kontaktilo, kaj la rezultaj informoj aperos nur en *Juna amiko*: en numeroj 92/3 kaj 93/1 respektive. Ekzempleroj ekster la revuo estas peteblaj de sekciestroj, perantoj de *Juna amiko* (kiuj ricevos stoketojn) aŭ rekte de ĝia redakcio, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

ILEI labortable

Nia informado en Eŭropo

Dum speciala sesio en nia konferenco pri eksteraj rilatoj, kaj el la artikolo de prof. Glossop en la antaŭa IPR (paĝo 21), ni povas konstati, ke multo okazas tiurilate en Nord-Ameriko kaj en la rilatado kun Unesko. Tamen, tiu aktiveco ne estas spegulata en Eŭropo, kie la sola serioza agado estas la projektoj "Eŭropo 92" kaj la seminario por "Jaro de la Familio" de UN en 1994. Ni ja partoprenas en ambaŭ, sed ni povus imagi pli kompletan agadon, se ni nur povus trovi la fortojn. Sekve ni dediĉas *ILEI-labortable* ĉi-numere al analizo de la plej farinda minimumo, kun la celo veki la intereson de individuoj aŭ sekcioj, kiuj emus reagi: "Nu, **ni** povus plenumi tian planon!" Estu certa, ke sen la leviĝo de novaj fortoj, ĉi tiuj belaj ideoj restos ĝuste tiaj — paperaj ideoj. Ni volas konvinki kelkajn en niaj pli fortaj sekcioj transpreni parton de la internacia laboro — la kampo de eksteraj rilatoj kaj informado estas ideale taŭga por tio.

La unua paŝo estas arigo de bazaj informoj pri ne-registaraj edukaj instancoj, por ke ni decidu, kun kiuj ni plej utile prenu kontakton. Unuavice tiuj estu internaciaj (tutmondaj aŭ eŭropaj) sed duavice ankaŭ naciaj. Ni bezonas sekvajn informojn: (bv. reskribi la tuton, ĉi tio ne estas formularo!)

Nomo de la organizo: . . . . . .
Mallongigo(j): . . . . . .
Ĉu nacia, regiona, eŭropa, tutmonda?: . . . . . .
Adreso de sidejo: . . . . . .
Ĉefaj celoj: . . . . . .
Se internacia, adresoj de naciaj sekcioj: . . . . . .
Edukaj faciligoj, uzeblaj de ni (bibliotekoj, studcentroj, kursocentroj ktp.)
Regulaj eventoj . . . . . .
Nomo de periodaĵo . . . . . .
Ofteco/lingvo(j) . . . . . .
Redakcia adreso . . . . . .
Specoj de artikoloj akceptataj . . . . . .
Ekzistantaj kontaktoj kun la organizo (flanke de sekcio aŭ individuo) . . .
Pliaj utilaj sciigoj . . . . . .

Ni petas sekciojn resumi siajn ekster-rilatajn agadojn por ni en tiu formo, kaj unuopulojn sendi ĉiun utilan informon. Por la momento, tiuj informoj venu al ni en Budapeŝto, kie ni arigos ilin sed pludonos ilin al nova respondeculo aŭ teamo, tuj kiam tiu(j) anonciĝos. La imageblaj agadoj estas jenaj:

1. Sendado de informoj pri niaj agadoj;
2. Interŝanĝo de organoj kaj eldonaĵoj. (Eblus sendi IPR kune kun nacilingva resumo de ĝia enhavo);
3. Partopreno en foiroj, ekspozicioj, seminarioj pri lingvo-instruado;
4. Uzo de kurso-centro por okazigi kurson de instruista trejnado en Esperanto — eble kun subteno de la koncerna organizaĵo;
5. Livero de artikoloj al iliaj periodaĵoj;
6. Okazigo de komunaj aranĝoj.

GAZETARA SERVO

Parenca sed pli specifa agado estas la jam anoncita deziro fondi pedagogian gazetaran servon, kiu tamen ankoraŭ ne realiĝis. Tio ne devas esti grandioza nova strukturo; ekzistanta servo povus esti larĝigita plenumi ankaŭ tiun pedagogian taskon. Ni ja havas aktivulojn ĉi-kampe (ekz. s-roj Pirlot en Belgio kaj Klag en Aŭstrio) sed ni bezonas internacian kunordiganton. Koncize jen kiel ni imagas la servon:

Celoj: Dissendi diverslingve artikolojn al elektitaj pedagogiaj periodaĵoj. Povus temi pri:

- Koncizaj informoj pri niaj agadoj: kursoj, konferencoj, servoj
- La propedeŭtika valoro de Esperanto
- Edukado por internaciismo
- La praktikaj kaj etikaj valoroj de Esperanto
- Prezento de la rezultoj de Eo-instruado (korespondado, vizitoj ktp.)
- Specifaj aspektoj de fremdlingva instruado (kun ia ligo al Esperanto)

Paŝoj bezonataj:

1. Nomigo de kunordiganto de la servo; arigo de reto de kunlaborantoj.
2. Kompilo de listo de traktindaj eldonaĵoj: (nomo, adreso, eldonisto, ofteco, amplekso, lingvo(j), profilo, legantaro, kontakt-personoj, E-rilataj materialoj jam aperigitaj)
3. Kompilo de listo de taŭgaj verkantoj de fakaj artikoloj - kiuj verkos kiulingve?
4. Kompilo de listo de eblaj tradukantoj.
5. Decidoj pri la distribua formo: poŝto, fakso, telekso ktp.
6. Decidoj pri la labor-metodoj inter kunlaborantoj - verki, traduki, administri, dissendi.
7. Decidoj pri manieroj kunlabori kun aliaj servoj — unuavice kun la Gazetara Servo de UEA kaj tiuj de regionaj E-Centroj.
8. Ebleco funkciigi paralele (sed kun alia enhavo) Esperant-lingvan servon por dissendi niajn informojn al movadaj gazetoj kaj radio-stacioj.
9. Ellaboro de buĝeto kaj financado por la tuto.

Por la momento al Budapeŝto venu reagoj — ili estu la sekvaj:

- proponoj aŭ sinproponoj por gvidi la informan laboron en Eŭropo;
- proponoj aŭ sinproponoj kunlabori en la teamo;
- proponoj aŭ sinproponoj por gvidi la gazetaran servon;
- proponoj aŭ sinproponoj kunlabori en la teamo;
- informoj pri pedagogiaj instancoj laŭ la supraj rubrikoj;
- informoj pri pedagogiaj eldonaĵoj laŭ la tuj supraj rubrikoj;
- informoj pri jam ekzistanta kaj kuranta laboro ĉi-kampe.

La koncernaj gvidantoj povos iĝi komisionestroj aŭ eĉ estrara komisiito, kaj kunlabori kun s-roj Glossop, Symoens, Klag kaj Pirlot.

Ekstera agado ne devus esti ekster-ordinara.

Ni ordinarigu ĝin — pere de **via** helpo!

Salutas de malantaŭ la labortablo, Stefan MacGill, prezidanto.

Labortablete

Landaj sekcioj: La listo de sekcioj fine de la revuo montras kontentigan kreskon, kaj tiu de la reprezentantoj mirindan — kun deko da novaj. Memoru, ke estas pli ol 170 landoj en la mondo, do 120 restas nekontaktitaj! La plimulto de tiuj kuŝas en nepagipovaj mondpartoj, do kiam ni trovos reprezentantojn, ni devos membrigi ilin el la Koleghelpa Kaso. Viaj kontribuoj al ĝi helpos nin tutmondiĝi!

La raporto pri la sekcioj kompilita en Bratislavo aperas en ĉi tiu IPR. En aŭgusto ni dissendis al sekciestroj voĉdonilon pri akcepto de sekcio en Kubo; la pet-leteron ni aperigas en ĉi tiu IPR. Komitatanoj kaj membroj bv. nepre kontakti la sekciestron, por ke tiu povu voĉdoni ĝis la jarfino.

Administrado: Samtempe kun tiu voĉdonilo disiris formularo per kiu sekcioj nomu siajn komitatanojn surbaze de la membronombro 1991. Tio helpos nin ŝpari tempon komence de la komitat-kunsidoj. Antaŭ la venonta konferenco ni konformigos la liston se necese al la membro-nombroj el 1992 kaj donos al sekcioj eblecon skribe nomi anstataŭantojn. Do, en la sekcioj bv. elekti aŭ decidi pri viaj komitatanoj, se ne jam farita.

Vidu la protokolon de la bratislavaj decidoj en ĉi tiu IPR.

Oficejo: Aldoniĝis al nia oficejo muso (komputila, ne biologia) kaj lasera printilo, per la sumoj de ĉ. 100 kaj 5000 svedaj kronoj respektive. Ĉi tiuj linioj estas inter la unuaj produktitaj pere de nia propra maŝino — ĝi ŝparos al ni multan tempon antaŭe uzitan por vojaĝado al printilo.

Ekzamenoj: Ni ĝojas raporti sesiojn en San-Francisko kaj La Chaux-de-Fonds en la semajnoj tuj post la kongresoj.

27a Konferenco: Ni planas tion en aŭ apud Valencio. Ni ricevis informojn pri kvar eblaj ejoj, unu en Valencio, unu en universitata urbo apude, unu 40km. for (kie okazos la Infana Kongreseto) kaj alia 85km for apud la maro. Ni indikis preferon por la tria; plenaj informoj kaj aliĝilo povos aperi en IPR 92/4 post vizito de la koncerna estrarano (s-ino Belosevic) al Hispanio novembre.

Ceteraj novaĵoj: *Juna amiko* anoncas signifan ekspansiigon — pri tio vidu aparte. Ne inundas nin aliĝoj al la instruista kurso en Poprad, anoncita per aliĝilo en la antaŭa IPR. Vidu la ripetan alvokon aliloke en la numero. Ĉu kelkaj sekcioj ne povus serioze konsideri finance subteni la vojaĝon de taŭga kandidato? Informoj pri instruistaj kursoj en 1993 en la venonta IPR.

koncize resalute, smg

BUĜETOJ ILEI 1991 - 1993 (svedaj kronoj)

Rimedoj	Buĝeto 91	Rezulto 91	Buĝeto 92	Buĝeto 93
Membrokotizoj	30.000	35.250:44	32.000	34.000
Libroj, por kotizoj	600	757:35	500	500
Koleghelpa kaso	500	–375:20	500	1.000
Fondaĵo Szerdahelyi	5.000	1.156:38	5.000	3.000
Konferencoj (nete)	1.000	10.240:96	2.000	3.000
Kompensoj UEA	9.000	4.866:75	9.000	9.000
Eldonado (nete)	3.000	4.046:74	10.000	10.000
Rentoj	8.000	6.400:73	8.000	6.000
Ekspansio	-	-	-	6.000
Donaco	-	1.622:25	-	-
Diversaĵoj	-	7670:49	-	-
SUME:	**57.100**	**70.074:53**	**67.000**	**72,500**
Kostoj				
IPR	31.000	35.092:06	35.000	37.000
Afranko, telefono	4.000	888:76	5.000	3,000
Presaĵoj, fotokopioj	5.000	5.029:48	5.000	4.000
Ekzamenoj (nete)	2.000	+298:93	1.000	500
Metodikaj kursoj	100	-	2.000	4.000
Estraro	7.000	4.679:64	8.000	6.000
Honorarioj – nunaj	8.000	5.175:70	12.000	12.000
Honorarioj – ekspansiaj	-	-	-	8.000
UK/Konferencaj kostoj	-	-	3.000	-
Oficeja luo	-	-	-	3.000
Juna amiko (nete)	1.500	-	2.000	2.000
Bankkostoj	-	821:69	-	1.000
Kotizo UEA	-	749:48	nebuĝetite	800
Azia agado	-	1.680:00	nebuĝetite	2.500
Diversaj	-	11.838:96	-	-
SUMO	**58.600**	**64.571:44**	**73.000**	**84.800**

La supra prezento celas doni superrigardon pri la evoluo de la financoj de la Ligo. La sumo por IPR kovras kvar numerojn. La rubriko 'ekspansio' troviĝas duloke, kiel kosto sub honorario kaj kiel enspezo. Tiuj kostoj ne nepre okazos; sed ĝi donas al la estraro la liberecon financi ekspansion (ekz. honorarii personon, kiu kompetentas pri aparta bezonata tasko), se la kondiĉoj favoros tion. Tamen buĝeta kondiĉo de tiu ekspansio estas, ke tiu agado kovru minimume 75% de siaj kostoj, eĉ ene de la koncerna jaro. La Ligo ekspansias ankaŭ per aĉeto de maŝinaro (muso, lasera printilo) sed esperas kovri la koston de tio ene de la spezoj por *IPR, Juna amiko* kaj la eldonado.

La rezultaj ciferoj por 1991 estas aperigitaj ĉi tie nur por komparaj celoj. La oficialaj spezoj aperis en la antaŭa numero. Ĉi tie ni kombinis kelkajn rubrikojn kaj sub 'Diversaĵoj' metis sumojn kiuj nur en kaj eliris la kontojn, por faciligi la komparojn kaj la prezentadon.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio: Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉehio: Miroslav Malovec, Charkovska 7/10, CS-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Juhkentali 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio: *vakas*
Germanio: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio: *vakas*
Korea Resp.: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Zdenka Svetličić, Kroatia E-ista Unio, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb
Nederlando: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: *Turnu vin al* NEL, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5
Pollando: Maria Czekanska, str. Kotarska 6/3, PL-50-150 Wroclaw
Portugalio: D-ro Antonio M.C. Coimbra, Rua Colonel M. Leitao 20.1 Esq., P-1700 Lisbon
Rumanio: Angela Stoica, Platanilor 17 C ap. 4, R-1900 Timisoara
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Slovenio: Sonja Tavcar, Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz
Sud-Afriko: Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando: Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
Venezuelo: Ing. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaíre)

REPREZENTANTOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl Mezini, p/a Albana Esperanto-Ligo, Gafur Muco, Rruga "Thanas Zikõ Nr. 56, Tirana
Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P. O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P. O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Nordurbraut 9, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kubo: Hector Jiménez, Vista Alegre 264 e/J.B. Zayas y Luz, Caballero, Vibroa, 11500 C. Habana.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LIT-2044 Vilnius.
Niĝerio Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-Biakou Yao, B.P. 20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UKR-253222 Kiev.

LABORKOMISIONOJ

Statistiko: Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70.87.00

Didaktikaj lud(il)oj: Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle; tel. (+32 71) 43.62.05

Eŭropa Komunumo '92 kaj informado en internaciaj pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout (Heide); tel. (+32 3) 666.62.66

UN-Jaro de la familio 94: MacGill-Glossop

Gazetara servo: Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien; tel. (+43 222) 36.86.29

Terminologio: K. Smideliusz, Apáczai sétany 10, H-9700 Szombathely; tel. (+36 94) 20.313

Statuto: Oene Hoekstra kaj Rob Moerbeek, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl; tel. (+31 2209) 15.65

Ekzamenoj: Marie Hunninck, Centre Culturel „La Charité", BP 136, F-84204 Carpentras

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyiri u.11, H-6500 Kécskemet

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO (Rilatoj de reciproka informado, Kat. C): Place Fontenoy, F-75007 Paris
Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binennweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR tajpitaj nete per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj aŭ komputile sur 5,25- colaj disketoj per IBM-PC-kongrua sistemo kaj konata tekst-prilaborilo, al la adreso de la redaktejo (vidu kovrilpaĝon). Skribu viajn nomon kaj adreson sur la manuskripto.

ABONADO AL IPR KAJ MEMBRIĜO AL ILEI

Membrokotizo 50 Svedaj kronoj.

1) Poŝtĝirkonto 682117-7 (Stockholm). „La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj" (ILEI), Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).

2) Poŝtĝirkonto 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ilek-a de ILEI.